



Internacia Librotrezoro

Kajero Va/VIa

La malsanulo pro imago

Komedio en tri aktoj

de

Molière.

El franca lingvo tradukita de

Rektoro W. Velten

Lingvokomitato kaj Komisaro por instruistokzamenoj ĉe la Saksa Esperanto-Instituto, Dresden



Eldonejo ■ Verlag
Deutsche Esperanto-Buchhandlung
Germana Esperanto-Librejo
Leipzig

Internacia Librotrezoro

Kolekto de elektitaj kaj aparte rekomendindaj romanoj, noveloj, humoraĵoj, poemoj, teatraĵoj k. t. p.

Originaloj kaj Tradukoj de ĉiunaciaj aŭtoroj.

Ĉiu kajero kostas Sm. 0.10.

1. Rozo sovaĝa aŭ pentita kulpo. Novelo. Versaĵoj de **P. Kress**.
- 2/4. Sableroj. Eldono de ĉiuj verkoj de S-ino Prof. **Marie Hankel**.
Eldono bele bindita. Sm. 0.50.
- 5/6. La malsanulo pro imago. Komedio de Molière, esperantigis **Rektoro W. Velten**, Lingvokomitatano.

La kolekto estas daŭrigota.

Rekomendindaj Muzikaĵoj.

- Herbig, M.** Patro nia. Eldono por kanto kaj fortepiano (orgeno aŭ harmoniumo). Sm. 0.75.
- Ménil, F. de.** Esperantujo. (Poezio de M. Hankel.)
Eldono por kanto kaj fortepiano. Sm. 0.50.
- Verda Stelo. (Poezio de M. Hankel.)
Eldono por kanto kaj fortepiano. Sm. 0.50.
- Espero, por kanto kaj fortepiano. Sm. 0.25.
- Espero, eldono por fortepiano. Sm. 0.25.
- Tekstfolioj po 10 ekz. 0.10; po 50 ekz. 0.40; po 100 ekz. Sm. 0.50
- Saavedra, D.** Valso esperantista, por fortepiano. Sm. 0.50.
- Simon, E.** Patrino kaj infano, por kanto kaj fortepiano. Sm. 0.25.
- Strzelecki, H.** Sopiro, por fortepiano. Sm. 0.50.

Deutsche Esperanto-Buchhandlung, Leipzig

ADER & BOREL G.m.b.H.
ESPERANTO-VERLAG VERLAGS-ANSTALT
DRESDEN-A.1. STRUVESTR.40.

II - 164

Quick

Internacia Librotrezoro

Kajero Va/VIa

Sm. 0.20

La malsanulo pro imago

Komedio en tri aktoj

de

Molière.

El franca lingvo tradukita de

Rektoro W. Velten,

Lingvokomitatano kaj Komisaro por instruisto-ekzamenoj ĉe la Saksa Esperanto-Instituto, Dresden.

Eldonejo — Verlag

Germana Esperanto-Librejo

Deutsche Esperanto Buchhandlung

Leipzig 1911.

11569

546755



B2-2

Ĉiuj rajtoj rezervataj. — Represo malpermesata.

La elskribado de la roloj por publikaj prezentadoj estas leĝe malpermesata. Pro tiu kaŭzo oni liveras plenajn tekstojn kiel rololibrojn je malpli kara prezo, tiamaniere, ke 12 libretoj kostas Sm. 1.20. Tiajn mendojn plenumos tute sole la eldonejo.

821.133.1-2

Antaŭparolo.

Kial mi elektis por tradukado tiun ĉi malnovan francan komedion? Tiun demandon mi eble povas antaŭe respondi.

- 1 e Ĉar ĝi estas vera, gaja kaj viva komedio, per kiu la Esperantisto-komencanto povas ludante ellerni buŝan konversacion;
- 2 e ĉar mi volas prezenti al la progresintaj lernantoj iom pli malfacilan legaĵon, ol fabeloj, malgrandaj rakontoj k. t. p. povas doni;
- 3 e ĉar (kaj tio estas por mi vere la ĉefafero,) kontraŭ la troprudentuloj, kiuj pretendas, ke Esperanto ne ebligas, esprimi la delikataĵojn de la naciaj lingvoj, mi volas pruvi, ke ĉi-tiurilate neniu el la vivaj, kaj ankoraŭ pli mal-multe el la malvivaj lingvoj, povas konkuri kun Esperanto. Por ĉiu sperta kaj klera Esperantisto tio cetere ne estas io nova. Ĉar fine tiu ĉi Molière'a komedio estas prezentota en Esperanto dum la „Dresden'a Higiena Ekspozicio“ de 1911, mi transdonas tiun ĉi tradukon al la publiko.

Dresden-Laubegast.

Rektoro W. Velten,
Membro de la Lingva Komitato.

ES

La malsanulo pro imago.

Personoj:

Argano, la malsanulo pro imago; vestita kiel malsanulo: longaj ŝtrumpoj, pantofloj, mallonga, malvasta pantalono, ruĝa kamizolo, garnita per pasamentoj kaj punktoj, malnovmoda koltuko, senzorge ĉirkaŭligita, dormĉapo, garnita per punktoj.

Belino, dua edzino de Argano.

Angeliko, filino de Argano kaj amatino de Kleanto.

Luizo, filineto de Argano kaj fratino de Angeliko.

Beraldo, frato de Argano, kavaliro vestita.

Kleanto, amanto de Angeliko. Li estas delikate kaj malpeze vestita.

Sinjoro Diaforuso, kuracisto.

Tomaso Diaforuso, lia filo kaj amanto de Angeliko.

Sinjoro Purgono, kuracisto de Argano.

La tri lastaj personoj, nigre vestitaj, portas kutiman kuracistvestaĵon, kun escepto de Tomaso Diaforuso, kiu portas longan, simplan kolumon; liaj haroj estas longaj kaj glataj; lia mantelo sin etendas ĝis la genuoj, kaj li havas mienon treege stultan.

Sinjoro Floranto, apotekisto, ankaŭ nigre aŭ malhelgrize vestita, sed sen ĉapelo, portas antaŭligitan telertukon kaj en la mano klisterilon.

Sinjoro Bonfido, notario.

Toineto, servistino.

La scenejo estas Paris.

ES

Akto unua.

Sceno unua.

Argano (sidante ĉe tablo kaj provkalkulante per ludmarkoj la konterojn de l'kalkulo de sia apotekisto). Tri kaj du estas kvin, kaj kvin estas dek, kaj dek estas dudek; tri kaj du estas kvin. „Plie: la dudek-kvaran: insinuativa, prepara kaj moliga klistereto, por moligi, malsekigeti kaj refreŝigi la internaĵon de Lia Moŝto . . .“ (Kio plaĉas al mi ĉe sinjoro Floranto, mia apotekisto, estas tio, ke liaj kalkuloj ĉiam tiel ĝentile estas redaktitaj.) „La internaĵon de Lia Moŝto tridek soldojn.“ Jes, sed, mia bona sinjoro Floranto, esti ĝentile ne sufiĉas; oni ankaŭ devas esti malmultekosta kaj ne senhăitigi siajn pacientojn. Unu klistero tridek soldojn! Mi estas via servanto! Mi jam diris al vi; en aliajn kalkulojn vi ilin enmetis po dudek soldoj; kaj dudek soldoj estas en apotekista lingvo dek soldoj; do ni skribu: „dek soldojn.“ „Plie: la saman tagon: bone puriganta klistero, kunmetita de duobla katolikono (universalrimedo), rabarbo, rozmielo kaj aliaj ordonitaj rimedoj, por balai, lavi kaj purigi la subventron de Lia Moŝto,

„tridek soldojn“. Kun via permeso, dek soldojn.
„Plie: la saman tagon vespere: julepo hepata kaj dormiga, kunmetita por havigi dormon al Lia Moŝto: tridek-kvin soldojn.“ Pri tio ĉi mi ne plendos, ĉar ĝi igis min bone dormi. Dek, dek-kvin, dek-ses kaj dek-sep soldoj kaj ses denaroj.
„Plie: vespere de tiu sama tago: bona puriganta kaj fortiganta medikamento, konsistanta el freŝa kasio kun orienta kasifolio kaj aliaj kunmiksitaĵoj laŭ la ordono de s-ro Purgono, por elpeli kaj elirigi la galon de Lia Moŝto: kvar frankojn.“ Oho, sinjoro Floranto, vi volas min moki. Oni devas vivi kaj lasi vivi. S-ro Purgono ne ordonis al vi, enmeti kvar frankojn. Enmetu, enmetu, enmetu tri frankojn, se plaĉos! Dudek kaj tridek soldojn. „Plie: la saman tagon: trinkaĵo sensuferiga kaj adstringa por endormigi Lian Moŝton: tridek soldojn.“ Bone, dek kaj dek-kvin soldoj.
„Plie: la dudek-sesan: klistero kontraŭgaza, por elpeli la ventojn de Lia Moŝto, tridek soldojn.“ Dek soldojn sinjoro Floranto. „Plie: la klistero de sinjoro, refarita vespere, kiel supre: tridek soldojn.“ Sinjoro Floranto, dek soldojn. „Plie: la dudek-sepan: bona medikamento, kunmiksita por elpeli la (defekaĵojn) malbonajn fluidaĵojn de sinjoro: tri frankojn.“ Bone, dudek kaj tridek soldoj; mi tre ĝojas, ke vi estas prudenta. „Plie: la dudek-okan: porcio de selakto klarigita kaj dol-

ĉigita, por dolĉigi, malvarmetigi kaj refreŝigi la sangon de Lia Moŝto: dudek soldojn.“ Bone, dek soldojn. „Plie: trinkaĵo refortiga kaj antaŭgarda, kunmetita de dek-du eroj da bezoarŝtono, siropo de citrono kaj granato, kaj aliaj laŭ ordono: kvin frankojn.“ Ha, sinjoro Floranto, pli dolĉe (milde), se plaĉos; se vi tiel daŭrigos, oni ne plu volas esti malsana; kontentiĝu je kvar frankoj. Dudek kaj kvardek soldoj. Tri kaj du estas kvin, kaj kvin estas dek, kaj dek estas dudek. Sesdek-tri frankojn, kvar soldojn kaj ses denarojn. Laŭ tio do mi uzis en tiu ĉi monato unu, du, tri, kvar, kvin, sep, ok medikamentojn, kaj unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, dek-unu, dek-du klisterojn; dum, en la pasinta monato mi prenis dek-du medikamentojn kaj dudek klisterojn. Mi ne miras (Ne estas mirinde), ke mi ne tiel bone fartas en tiu ĉi monato kiel en la pasinta. Tion mi diros al sinjoro Purgono, por ke li tion ordigu. He, forigu ĉion ĉi tion! (Vidante, ke neniu ĉeestas.) Neniu ĉi tie? Mi povas paroli, kion mi volas, ĉiam ili lasas min sola; ne ekzistas rimedo, por ilin haltigi ĉi tie? (Sonoriginte tintilon, kuŝantan sur la tablo.) Neniu aŭdas. La tintilo eble estas tro malforta. Tintilin, tintilin, tintilin! (Sonoriginte la duan fojon.) Vane, neniu venas. Tintilin, tintilin, tintilin! (Sonoriginte de-

nove.) Ili estas surdaj. Toineto! Tintilin, tintilin, tintilin. (Bruiginte kiel eble plej multe per sia tintileto.) Tute kvazaŭ mi ne estus sonoriginta. Sentaŭgulino! Friponino! Tintilin, tintilin, tintilin! (Vidante, ke li sensukcese sonorigas.) Mi furioziĝas. Tintilin, tintilin, tintilin! Pendindulino, al ĉiuj diabloj! Ĉu estas eble, ke oni lasas malfeliĉan malsanulon tiel sola? Tintilin, tintilin, tintilin! Kia kompatinda situacio! Tintilin, tintilin, tintilin! Ho, mia Dio! Ili lasas min morti ĉi tie. Tintilin, tintilin, tintilin!

Sceno dua.

Argano. Toineto.

Toineto (enirante). Jen mi estas, sinjoro.

Argano. Ha, virinaĉo! Sentaŭgulino!

Toineto (ŝajnigas ke ŝi alfrapiĝis al io per la kapo). La diablo prenu vian malpaciencon! Vi preme gas la homojn tiel, ke mi alfrapis la kapon al elstaraĵo de fenestra kovrilo.

Argano (kolere). Vi perfidulino!

Toineto (interrompante Arganon). Ho ve!

Argano. Jam de...

Toineto. Ho ve!

Argano. Jam depost unu horo...

Toineto. Ho ve!

Argano. Vi min forlasis...

Toineto. Ho ve!

Argano. Silentu do! friponino, por ke mi vin insultu.

Toineto. Je mia fido, mi opinias ke ne, post kiam mi difektis mian kapon.

Argano. Vi min lasis tie ĉi kriegadi, pendindulino.

Toineto. Kaj vi, vi al mi frakasigis la kapon. Unu egalvaloras la alian, sed ni paciĝu, se vi konsentas.

Argano. Kio! friponino . . .

Toineto. Se vi min insultas, mi ploregos.

Argano. Min forlasi, pendindulino!

Toineto (denove interrompante Arganon). Ho ve!

Argano (kolere). Virinaĉo! Vi volas . . .

Toineto. Ho ve!

Argano. Kio! Ĉu mi eĉ ne devas havi la plezuron ŝin insulti?

Toineto. Insultu min plensate, mi ne ĝin malhelpos.

Argano. Vi ja min malhelpas paroli, sentaŭgulino, senĉese min interrompante.

Toineto. Se vi havas la plezuron, min insulti, konvenas al mi plori. Al ĉiu la lian; tio ne estas maljusta. Ho ve!

Argano. Bone, ni volas tion preterlasi. Forprenu tion, sentaŭgulino, forprenu tion. (Stariĝinte.) Ĉu mia hodiaŭa klistero bone efikis?

Toineto. Via klistero?

Argano. Jes, ĉu mi defekis multe da galo?

Toineto. Je mia fido. Mi tute ne enmiksiĝas en tiajn aferojn. Estas la devo de sinjoro Floranto, meti sian nazon en ĝi, ĉar li profitas de tio.

Argano. Oni zorge pretigu buljonon por la alia klistero, kiun mi baldaŭ prenos.

Toineto. Tiu sinjoro Floranto kaj tiu sinjoro Purgono bone amuziĝas je la kostoj de via korpo; vi estas por ili bona, laktodonanta bovino; kaj mi dezirus iam ilin demandi, kian malsanon vi havas, ĉar ili donas al vi tiom da kuraciloj.

Argano. Silentu, malsaĝulino; ne estas vi, kiu havas la oficon, kontroli la ordonojn de la medicino. Oni alvoku al mi mian filinon Angelikon. Mi volas ion diri al ŝi.

Toineto. Jen, ŝi jam alvenas; ŝi certe divenis viajn pensojn.

Sceno tria.

Argano. Angeliko. *Toineto.*

Argano. Alproksimiĝu Angeliko, vi venas ĝustatempe, mi volas paroli kun vi.

Angeliko. Mi estas preta aŭdi vin.

Argano. Atendu. (Al *Toineto*) Donu al mi mian bastonon; mi tuj revenos.

Toineto. Rapidu, sinjoro, rapidu; Sinjoro Floranto alportas al ni okupadon.

Sceno kvara.

Angeliko. Toineto.

Angeliko. Toineto!

Toineto. Kio?

Angeliko. Rigardu min iom.

Toineto. Nu? Mi rigardas vin.

Angeliko. Toineto!

Toineto. Nu? Kio estas?

Angeliko. Ĉu vi ne divenas tion, pri kio mi deziras paroli?

Toineto. Ho jes, mi ĝin divenas; pri via juna amanto; ĉar de ses tagoj ni ja nur interparoladas pri li, kaj vi ne fartas bone, se vi ne ĉiam parolas pri li.

Angeliko. Se vi tion tiel bone scias, kial vi do ne komencas paroli pri li? Kaj kial vi ne ŝparas al mi la penon, konduki vin al tiu temo?

Toineto. Vi ja ne lasas al mi la tempon por tio; kaj vi mem tion prizorgas, tiel ke estas malfacile al mi, vin antaŭveni.

Angeliko. Jes, mi konfesas, ke mi tute ne povas ĉesi paroli pri li, kaj ke mia koro profitas ĉiun momenton por malkovriĝi al vi. Sed, diru al mi, ĉu vi mallaŭdas min, Toineto, pro la inklinemo, kiun mi sentas kontraŭ li?

Toineto. Tute ne!

Angeliko. Ĉu mi estas malprava, ke mi min allasas al tiuj dolĉaj sentoj?

Toineto. Mi opinias, ke ne.

Angeliko. Ĉu vi eble dezirus, ke mi estu sententa kontraŭ la karesaj certigoj de lia flama pasio, kiun li al mi montras?

Toineto. Pro Dio ne!

Angeliko. Diru do al mi; ĉu vi kiel mi, ne trovas ion ĉielan, ian efikon de l'sorto en la neatendita okazaĵo de nia konatiĝo?

Toineto. Jes.

Angeliko. Ĉu vi ne opinias, ke li, kiu, ne min konante, prenis sur sin mian defendon, sin karakterizis honesta viro?

Toineto. Jes, kompreneble.

Angeliko. Ke oni ne povas agi pli noble?

Toineto. Mi konsentas!

Angeliko. Kaj ke li ĉion faris kun la plej granda ĉarmo?

Toineto. Ha jes!

Angeliko. Ĉu vi ne opinias, Toineto, ke li havas belan staturon?

Toineto. Certe.

Angeliko. Kaj ke li havas bonegan mienon?

Toineto. Sendube.

Angeliko. Ke ĉio, kion li parolas kaj faras, havas ion noblan?

Toineto. Efektive.

Angeliko. Ke oni ne povas aŭdi ion pli pasian, ol tion, kion li al mi diras?

Toineto. Vere.

Angeliko. Kaj ke ne ekzistas io pli ĉagrena, ol la malfacilaĵoj, kiujn oni faras al mi, kaj kiuj malhelpas ĉiun esprimon de nia reciproka amo, kiun la ĉielo nin inspiris?

Toineto. Vi estas prava.

Angeliko. Sed, mia kara Toineto, ĉu vi kredas, ke li min amas tiom, kiom li al mi diras?

Toineto. Hm, hm. Tiaj aferoj kelkafoje ne estas garantiablaj. La ŝajnigo de l'amo ofte forte similas al la vero, kaj rilate tion mi jam vidis grandajn komediantojn.

Angeliko. Kion vi diris? Ho ve! Ĉu laŭ lia parolmaniero estus eble, ke li ne diris al mi la veron?

Toineto. Ĉiuokaze vi baldaŭ estos klarigita pri tio; kaj la decido, pri kio li hieraŭ al vi skribis, peti vian edziĝon, estas la plej certa rimedo, konigi al vi, ĉu li diras la veron aŭ ne. Tio estos la plej bona provo.

Angeliko. Se tiu ĉi min trompas, mi ne kredos plu iun ajn viron dum mia tuta vivo.

Toineto. Jen via patro revenas.

Sceno kvina.

Argano. Angeliko. Toineto.

Argano. Do, mia filino, mi alportas al vi sciigon, kiun vi eble ne atendas. Oni volas edziĝi je vi . . . Kio okazis? Vi ridas? La vorto „edziĝi“ plaĉas al vi; jes, neniuj vorto ĝojigas junulinojn pli ol tiu ĉi. Ho, naturo, naturo! Kiom mi rimarkas, mia filino, mi ne plu bezonas vin demandi, ĉu vi deziras edziniĝi.

Angeliko. Mi devas fari, mia patro, kion vi laŭ via plaĉo min ordonos.

Argano. Mi tre ĝojas, havi tian obeeman filinon; la afero estas do decidita, kaj mi vin fianĉigis.

Angeliko. Estas mia devo, mia patro, blinde sekvi vian volon.

Argano. Mia edzino, via duonpatrino, ja deziris, ke mi igis vin monaĥino, kiel ankaŭ vian fratineton Luizon, kaj ĉiutempe ŝi persistis je tio.

Angeliko (flanken). Tiu perfidulino bone scias la kialon.

Argano. Ŝi ne volis konsenti tiun ĉi edziĝon sed mi ŝin konvinkis, kaj mia parolo estas donita.

Angeliko. Ha, mia patro, kiel danko mi estas al vi pro via granda boneco.

Toineto (al Argano). Efektive, pro tio mi estas

al vi tre danka; en via tuta vivo vi ne faris ion pli saĝan.

Argano. Mi ankoraŭ ne vidis la personon; sed oni diris al mi, ke mi estos kontenta je li, kaj vi ankaŭ.

Angeliko. Certe, mia patro.

Argano. Ĉu vere? Vi lin jam vidis?

Angeliko. Ĉar via konsento permesas al mi, malfermi al vi mian koron, mi ne volas kaŝi al vi, ke mi hazarde antaŭ ses tagoj konatiĝis kun li, kaj ke lia edziĝpeto estas sekvo de la inklino, kiu nin ambaŭ reciproke ekkaptis de la unua vido.

Argano. Tion oni min ne diris; sed mi tre ĝojas pri tio, kaj des pli bonaj staras niaj aferoj. Oni diras, ke li estas granda, beleta junulo.

Angeliko. Jes, mia patro.

Argano. Belkreska.

Angeliko. Sendube.

Argano. Agrabla persono.

Angeliko. Certe.

Argano. Kun afabla vizaĝo.

Angeliko. Tre afabla.

Argano. Prudenta kaj de bona deveno.


Angeliko. Tutege.

Argano. Tre honesta.

Angeliko. La plej honesta junulo en la mondo.

Argano. Kiu bone parolas, latine kaj greke.

Angeliko. Tion mi ne scias.



Argano. Kaj kiu en la daŭro de tri tagoj ricevos sian kuracisto-diplomon.

Angeliko. Ĉu li, mia patro?

Argano. Jes, ĉu li tion ne diris al vi?

Angeliko. Efektive ne. Kiu tion diris al vi?

Argano. Sinjoro Purgono.

Angeliko. Ĉu sinjoro Purgono lin konas?

Argano. Kia demando! Li do devas lin koni, ĉar tiu ĉi ja estas lia nevo.

Angeliko. Kleanto, nevo de sinjoro Purgono?

Argano. Kiu Kleanto? Ni parolas pri tiu, kiu volas edziĝi je vi.

Angeliko. Certe, jes.

Argano. Nu bone, li estas la nevo de sinjoro Purgono, la filo de ties bofrato, doktoro Diaforuso; kaj tiu ĉi filo sin nomas Tomaso Diaforuso, kaj ne Kleanto; hodiaŭ matene mi interkonsentis tiun ĉi edziĝon kune kun sinjoroj Purgono kaj Floranto; kaj morgaŭ la estonta bofilo al mi estos prezentata per sia patro. — Kio okazis? Vi ja estas tute miregigita!

Angeliko. Ĉar vi parolas pri alia persono, mia patro, ol tiu, kiun mi opinias.

Toineto. Pardonu, sinjoro, ĉu vi estus ekpensinta tiun ridigindan projekton? Ĉu estas eble, ke vi kun via tuta havaĵo volus edzigi vian filinon je kuracisto?

Argano. Jes, sentaŭgulino, ĉu tio rilatas vin?

Toineto. Mia Dio, ne do estu tiel kolerema. Vi ĉiam komencas per insultoj. Ĉu ni ne povas interparoli ne kolerigante? Jen, ni parolu malvarmsangece. Kiuj estas, se plaĉos, la motivoj por tia edziĝo?

Argano. Miaj motivoj estas jenaj. Sentante min malforta kaj malsana, kia mi ankaŭ estas, mia bofilo kaj ties parencoj devas esti kuracistoj, por ke ili donu al mi apogon kaj helpon kontraŭ mia malsano, ke mi havu en mia familio la fontojn de la rimedoj, kiujn mi bezonas, kaj ke mi ĉiumomente povu havi konsultojn kaj receptojn.

Toineto. Nu, tion mi nomas: diri motivojn, kaj estas plezuro, senkoloreme respondi unu al la alia. Sed, sinjoro, metu la manon sur vian koron: Ĉu vi vere estas malsana?

Argano. Kio, friponino? Ĉu mi estas malsana, ĉu mi estas malsana, senhontulino?

Toineto. Nu jes, jes, sinjoro, vi estas malsana, ni ne plu disputu pri tio. Jes, vi estas tre malsana, tion mi jesas kaj konfesas, multe pli malsana ol vi pensas; tio estas fakto. Sed via filino devas edziniĝi je viro por si mem, kaj, ne estante malsana, ŝi ne bezonas kuraciston kiel edzon.

Argano. Pro mi ŝi devas edziniĝi je kuracisto; kaj filino de bona karaktero devas esti ravita, kiam ŝi povas edziniĝi pro la sano de sia patro.

Toineto. Nu, sinjoro, ĉu vi permesas al mi, doni al vi amikan konsilon?

Argano. Kia estas tiu ĉi konsilo?

Toineto. Ne plu pensu je tiu ĉi edziniĝo.

Argano. Kaj pro kio?

Toineto. Ĉar via filino neniam ĝin konsentos.

Argano. Ŝi neniam ĝin konsentos?

Toineto. Ne.

Argano. Mia filino?

Toineto. Jes, via filino, ŝi diros al vi, ke ŝi neniam volas komunikiĝi kun sinjoro Diaforuso, nek kun lia filo Tomaso Diaforuso, nek kun ĉiuj Diaforusoj en la mondo.

Argano. Sed mi, mi volas komunikiĝi kun ili; ekster tio, ke tiu partio estas pli profitdona, ol oni pensas: Tomaso Diaforuso estas la sola heredonto de sia patro; kaj plie, sinjoro Purgono, kiu ne havas edzinon nek infanojn, donos al li sian tutan havaĵon por tiu ĉi edziĝo; kaj sinjoro Purgono estas homo, kiu havas renton da ok mil frankoj ĉiujare.

Toineto. Justa Dio! Por esti fariĝinta tiel riĉa, li devas esti mortiginta multe da homoj.

Argano. Rento da ok mil frankoj estas io, eĉ kiam oni ne kalkulas la patran havon.

Toineto. Sinjoro, ĉio tio estas bela kaj bona; sed ĉiam mi rememorigas al vi: Mi konsilas al

vi, inter ni ambaŭ, elekti por ŝi alian edzon; ŝi ne estas kreita, por fariĝi sinjorino Diaforuso.

Argano. Kaj mi postulas, ke ŝi tio fariĝu.

Toineto. Fi do, ne diru tion.

Argano. Kial mi ne tion diru?

Toineto. Ne, ne, sinjoro!

Argano. Kaj kial do ne?

Toineto. Oni eble diros, ke vi ne pripensis tion, kion vi diras.

Argano. Oni opiniu, kion oni volas; sed mi diras al vi, ke ŝi devas plenumi la promeson, kiun mi faris.

Toineto. Ne, mi estas certa, ke ŝi tion ne faros.

Argano. Mi ŝin devigos al tio.

Toineto. Ŝi ne ĝin faros, mi diras al vi.

Argano. Ŝi jam ĝin faros, aŭ mi metos ŝin en monaĥinejon.

Toineto. Vi?

Argano. Mi!

Toineto. Bone!

Argano. Pro kio bone?

Toineto. Vi ne ŝin metos en monaĥinejon.

Argano. Mi ne ŝin metos en monaĥinejon?

Toineto. Ne.

Argano. Ne?

Toineto. Ne.

Argano. Al la diablo! Tio estas ja tre amuza.

Mi ne metos mian filinon en monahinejon, se mi volas?

Toineto. Ne, kiel mi diras al vi.

Argano. Kiu do malhelpos min?

Toineto. Vi mem.

Argano. Mi mem?

Toineto. Jes. Vi ne havos la kuraĝon al tio.

Argano. Mi jam ĝin havos.

Toineto. Vi ŝercas.

Argano. Mi absolute ne ŝercas.

Toineto. La patra amemo vin detenos.

Argano. Ĝi min ne detenos.

Toineto. Unu larmeto aŭ du, unu ĉirkaŭpreno, unu ameme parolita „mia dolĉa paĉjo“ sufiĉos, por tuŝi vian koron.

Argano. Ĉio tio ne efikos.

Toineto. Jes, jes.

Argano. Mi diras al vi, ke mi ne cedos.

Toineto. Pa, bagateloj!

Argano. Ne bagateloj, tion mi certigas al vi.

Toineto. Mia Dio, mi vin konas; funde vi ja estas bonkora.

Argano. Mi tute ne estas bonkora, mi estas malbonkora, kiam mi volas.

Toineto. Kviete, sinjoro, vi ne pripensas, ke vi estas malsana.

Argano. Mi absolute ordonas al ŝi, ke ŝi sin preparu, por preni la edzon de mi elektitan.

Toineto. Kaj mi, mi absolute malpermesas al ŝi, tion fari.

Argano. Kie do ni estas, ke tia impertinentulino-servistino povas riski, tiamaniere paroli al sia mastro?

Toineto. Kiam mastro ne pripensas tion, kion li faras, tiam prudentega servantino estas prava, ĝin korekti.

Argano (ekkurante al *Toineto*). Ha, insultemulino, mi vin mortigos.

Toineto (evitante *Arganon* kaj metante seĝon inter si kaj li). Estas mia devo, kontraŭstari aferojn, kiuj povas vin senhonorigi.

Argano (kurante kun sia bastono post *Toineton* ĉirkaŭ la seĝon). Haltu, haltu, ke mi lernigu al vi tiel paroli!

Toineto (forkurante tien, kie *Argano* ne estas). Estas mia devo, antaŭgardi, ke vi faru malsaĝaĵojn.

Argano (same). Kanajlo!

Toineto (same). Ne, mi neniam konsentos tiun edziĝon.

Argano (al si mem). Pendindulino!

Toineto (tiel same). Mi tute ne volas, ke ŝi edziĝu je via Tomaso Diaforuso.

Argano (same). Bestaĉo!

Toineto (tiel same). Ŝi preferos obei min ol vin.

Argano (haltante). Angeliko, ĉu vi ne volas haltigi al mi tiun friponinon?

Angeliko. Ho, mia patro, ne vin malsanigu.

Argano (al Angeliko). Se vi ne ŝin haltigos al mi, mi vin malbenos.

Toineto (forirante). Kaj mi, mi ŝin senheredigis, se ŝi vin obeos.

Argano (sin ĵetante en sian seĝon). Ho, ĉielo, ĉielo! Mi ne plu povas. Tio estas mia morto!

Sceno sesa.

Belino. Argano.

Argano. Ha, mia edzino! Alproksimiĝu.

Belino. Kion vi havas, mia kompatinda edzeto?

Argano. Alvenu, por helpi min.

Belino. Kio do okazis, mia fileto?

Argano. Mia karulino!

Belino. Mia amiko!

Argano. Oni min furiozigis.

Belino. Ho, mia malfeliĉa paĉjo. Kio do okazis, mia amiko?

Argano. Via impertinenta Toineto fariĝis pli insultema ol iam.

Belino. Ne do pasiĝu plu.

Argano. Ŝi min kolerigis, karulino.

Belino. Kviete, mia filo.

Argano. Tutan horon ŝi kontraŭparolis en aferoj, kiujn mi volas plenumi.

Belino. Nur kviete, kviete!

Argano. Ŝi havis la senhontecon, diri al mi, ke mi tute ne malsanas.

Belino. Kia impertinentulino!

Argano. Vi do bone scias, mia karulino, kiom mi suferas.

Belino. Jes, jes, mia karulo, ŝi estas malprava.

Argano. Mia amata, tiu friponino min mortigos.

Belino. Kviete, nur kviete!

Argano. Ŝi sola kaŭzis, ke mi defekis tiom da galo.

Belino. Ne koleriĝu tiom.

Argano. Kaj mi jam ofte (mi ne scias kiomfoje), petis vin, ŝin forpeli.

Belino. Ho, mia filo, ĉiuj geservistoj havas siajn mankojn. Pro iliaj bonaj ecoj oni jam devas toleri la malbonajn. Toineto estas lerta, zorgema, diligenta kaj precipe fidela; kaj vi scias, ke nuntempe oni devas esti singarda rilate la homojn, kiujn oni estas dungonta. He, Toineto!

Sceno sepa.

Argano. *Belino.* *Toineto.*

Toineto. Sinjorino?

Belino. Kial do vi kolerigis mian edzon?

Toineto (dolĉete). Mi, sinjorino? Ho; mi ne scias, kion vi opinias, kaj mi nur prizorgas, esti kompleza al sinjoro en ĉiuj aferoj.

Argano. Ho, tiu perfidulino!

Toineto. Li diris, ke li volis edzigi sian filinon je la filo de sinjoro Diaforuso. Mi respondis al li, ke mi konsideras la partion profitiga al ŝi, sed ke, laŭ mia opinio, li bone agus, enmetante ŝin en monahinejon.

Belino. Tio do ne estas malbona, kaj mi juĝas, ke ŝi estas prava.

Argano. Ha, karulino, ĉu vi ŝin kredas? Ŝi estas krimulino. Ŝi diris al mi centon da insultoj.

Belino. Nu jes, mi vin kredas, mia amiko. Kvietiĝu. Toineto! Se vi denove kolerigas mian edzon, mi vin eksigos. Nu, alportu al mi lian peltmantelon kaj kapkusenojn, por ke mi lin oportune sidigu en la seĝon. Sed mi ankaŭ ne komprenas, kiamaniere vi tie sidas. Tiru do vian ĉapon ĝis sur viaj oreloj; per nenio oni povas pli rapide malvarmumi, ol kaptante trablovon per la oreloj.

Argano. Ha, mia kara, kiom mi dankas al vi pro via zorgemo.

Belino (aranĝante la kapkusenojn ĉirkaŭ la malsanulo). Stariĝu iomete, por ke mi povu subŝoviti tion sub vin. Tiun ĉi ni volas submeti kiel apogon, kaj meti alian sub la alian flankon. Tiun ĉi ni metu malantaŭ vian dorson, kaj tiu servu al vi kiel apogo por la kapo.

Toineto (fortege premante kapkusenon sur lian

kapon). Kaj tiu ĉi, por gardi vin kontraŭ vespera roso.

Argano (kolerege eksaltante kaj ĵetante la kusenojn al Toineto, kiu forkuras). Ho! friponino, vi min volas sufoki.

Sceno oka.

Argano. *Belino.*

Belino. Hoho! hoho! Kio do okazis?

Argano (sin ĵetante en la seĝon). Ho ĉielo! Mi ne plu povas.

Belino. Kial vi vin tiel ekscitas? Ŝi ja kredis bone agi.

Argano. Vi ne konas, karulino, la malicon de tiu ĉi pendindulino. Ho! ŝi min tiel ekscitegis; kaj mi bezonos pli ol ok medikamentojn kaj dekduon da klisteroj por rebonigi ĉion tion.

Belino. Nu, mia amiketo, kvietiĝu iom.

Argano. Patrineto, vi estas mia sola konsolo.

Belino. Malfeliĉa fileto!

Argano. Por pruvi mian dankon pro via sindonema amo, mi volas, mia koro, kiel mi jam al vi diris, mi volas fari mian testamenton.

Belino. Ho, mia amiko, ni ne parolu pri tio, mi petas; mi ne povus elporti tiun penson, kaj la sola vorto „testamento“ igas min ekstrema pro doloro.

Argano. Mi ja petis vin, paroli pri tio kun via notario.

Belino. Li jam estas tie interne, ĉar mi igis lin tuj min akompani.

Argano. Do lin envenigu, mia karulino.

Belino. Ho, mia amiko! Vere amegante sian edzon, oni tute ne estas kapabla, pensi al ĉio tio.

Sceno naŭa.

La notario. Belino. Argano.

Argano. Alproksimiĝu, sinjoro Bonfido, alproksimiĝu. Prenu seĝon, se plaĉos. Mia edzino diris al mi, sinjoro, ke vi estas tre brava homo kaj unu el ŝiaj plej bonaj amikoj; mi ŝin komisiis, paroli kun vi pro de mi farota testamento.

Belino. Ho, mi ne kapablas, paroli pri tiaj aferoj.

La notario. Ŝi informis min pri la intencoj, kiujn vi, sinjoro, havas rilate ŝin, kaj mi devas diri al vi, ke vi ne povos ion doni al via edzino per via testamento.

Argano. Ne? pro kio ne?

La notario. La kutimo tion kontraŭstaras. Se vi vivus en lando kun skribitaj leĝoj, oni tion povus fari; sed en Paris kaj en la landoj kun kutimaj leĝoj, almenaŭ en la plimulto da ili, tio ne estas efektivegebla, kaj la aranĝo estus senvalora. Ĉio kion en tiaj okazoj geedzoj povas fari unu por la alia, estas reciproka donaco vivtempa; ekster tio estas necese, ke ne ekzistas

infanoj, ĉu de ambaŭ edzigitaj, ĉu de unu el ili, post la morto de la unua mortonto.

Argano. Tio ja estas impertinenta kutimo, ke edzo ne povas postlasi ion al virino, de kiu li estas kore amata, kaj kiu lin tiom zorge flegas. Mi dezirus, konsulti mian advokaton, por aŭdi, kion mi povus fari.

La notario. Vi ne devas vin turni al advokatoj, ĉar ordinaro ili estas tre severaj en tio kaj konsideras kiel krimregon ĉiun trompon de la leĝo. Ili estas homoj, kiuj ĉie faras malfacilaĵojn, kaj ignoras la elturniĝojn de l'konscienco. Estas rekomendinde, konsulti aliajn personojn, kiuj estas multe pli komplezemaj, kaj kiuj havas rimedojn por preterpasi mallaŭte la leĝon kaj justigas tion, kio ne estas permesita; kiuj scias forigi la malfacilaĵojn de afero kaj trovi rimedojn, por eviti la kutimon per ia pera profito. Kio ni estus sen tiuj ĉi rimedoj? Oni bezonas favoraĵojn en tiaj aferoj; alie ni nenion atingus, kaj mi ne donus eĉ unu soldon por nia metio.

Argano. Mia edzino estis dirinta al mi, ke vi estas lertega kaj bravega homo. Diru do al mi, mi petas, kion mi devas fari, por doni al ŝi mian havon, senigante de ĝi miajn infanojn.

La notario. Kion vi devas fari? Vi povas simple elekti intiman amikon de via edzino, al kiu vi donas laŭleĝe per via testamento ĉion,

kion vi volas, kaj tiu ĉi amiko poste redonos ĝin al ŝi. Vi ankaŭ povas kontrakti grandan nombron da obligacioj nesuspektaj profite de diversaj kreditoroj, kiuj pruntedonas siajn nomojn al via edzino, kaj sekrete al ŝi donas deklaron, ke ili ĉion nur faris, por esti komplezaj al ŝi. Vi povas ankaŭ tiel longe, kiel vi vivos, enmanigi al ŝi kontantan monon aŭ kambiojn, pagotajn al posedanto.

Belino. Mia Dio, ne vin turmentu do per ĉi tio; se io okazus al vi, mi ne plu dezirus vivi.

Argano. Dolĉulino!

Belino. Jes, mia amiko, se min trafus la mal-feliĉo, vin perdi

Argano. Kara edzino!

Belino. La vivo nenion plu valorus al mi.

Argano. Amegata!

Belino. Mi sekvus vin en la morton, por montri al vi mian karesemon.

Argano. Amegata, vi fendas al mi la koron! Konsolu vin, mi petas.

La notario (al Belino). Viaj larmoj trofruas, sinjorino, tiu momento ankoraŭ ne estas alveninta.

Belino. Ho, sinjoro, vi ne scias, kio estas karesa amego al edzo.

Argano. La plej grava ĉagreno, kiam mi mortos, estas tiu, ke mi ne havas infanojn de

vi. Purgono iam estis dirinta al mi, ke li volis esti helpanta al mi pro tio.

La notario. Tio povas ankoraŭ okazi.

Argano. Karulino, mi nun volas fari mian testamenton tiel, kiel sinjoro diris; sed pro singardo, mi volas enmanigi al vi dudek mil frankojn el oro, kiujn mi havas en la tabulornamaĵo de mia alkovo, ekster tio du kambiojn pagotajn al la posedanto, kiuj estas subskribitaj, la unua de sinjoro Damono, la alia de sinjoro Geranto.

Belino. Ne, ne, mi nenion volas havi da tio. Ho! Kiom, vi diris, ke vi kaŝis en la alkovon?

Argano. Dudek mil frankojn, mia kara.

Belino. Ne parolu plu pri la mono, mi petas. Ho! Kiom estas la sumo de la du kambioj?

Argano. La unua, mia kara, sumiĝas je kvar mil, la alia je ses mil frankoj.

Belino. Ĉiuj trezoroj en la mondo ne vin egalvaloras.

La notario (al Argano). Ĉu ni nun volas koncepti la testamenton?

Argano. Jes, sinjoro. Sed ni estos pli senĝenataj en mia ĉambreto. Karulino, konduku min, mi petas.

Belino. Ni iru, mia kompatinda fileto.

Sceno deka.

Angeliko. Toineto.

Toineto. Ili kunvenis interne kune kun notario, kaj mi aŭdis paroladon pri testamento. Via duonpatrino ne kvietiĝas; sendube oni iel konspiras kontraŭ viaj interesoj, al kio ŝi volas instigi vian patron.

Angeliko. Li do disponu pri sia haveco laŭ plaĉo, supoze ke li ne disponas pri mia koro. Vi vidas, Toineto, kiel oni lin perfortas; ne forlasu min, mi petas, en tiu mizerego.

Toineto. Mi vin forlasi? Mi preferus morti. Via duonpatrino nur min igu sia konfidantino, kaj ŝi provu nur min aliĝi al siaj interesoj; mi neniam sentis inklinon al ŝi, kaj mi ĉiam min kalkulis al via partio. Lasu min fari; mi ĉion utiligos, por servi al vi. Sed por servi vin pli efike, mi volas ŝanĝi la armilojn, kaŝi la fervoron, kiun mi havas por vi, kaj ŝajnigi, kvazaŭ mi interesiĝus je la opinioj de via patro kaj de via duonpatrino.

Angeliko. Provu, mi vin petegas, sciigi al Kleanto pri la edziĝo, kiun oni estas ekintencinta.

Toineto. Mi ne havas alian personon por tiu ĉi komisiono ol la maljunan procentigiston Poliĉinelo, mian amanton; kostos al mi kelkajn kares-

aĵojn, kiujn mi volonte elspozos por vi. Hodiaŭ jam estas tro malfrue, sed morgaŭ, frumatene, mi sendos, por lin venigi, kaj li estos ravita

Sceno dekunua.

Belino (en la domo). Angeliko. Toineto.

Belino. Toineto!

Toineto (al Angeliko). Oni min vokas. Bonan vesperon! Fidu min.

Fino de la unua akto.

Akto dua.

(La scenejo prezentas la ĉambron de Argano).

Sceno unua.

Kleanto. Toineto.

Toineto (ne rekonante Kleanton). Kion vi deziras, sinjoro?

Kleanto. Kion mi deziras?

Toineto. Ha, ha! Estas vi! Kia surprizo! Kial vi ĉi tien venis?

Kleanto. Por sciiĝi mian sorton, paroli kun la aminda Angeliko, esplori la sentojn de ŝia koro, kaj demandi ŝin pri ŝia decido rilate la fatalan edziĝon, pri kiu oni min avertis.

Toineto. Jes, oni do ne povas kvazaŭ senpere paroli kun Angeliko; tio devas okazi mistere; oni ja diris al vi, kiel severe ŝi estas gardata, ke ne estas permesite al ŝi eliri, nek paroli kun iu; ke nur estis la scivolo de maljuna onklino, al kiu ni dankis la permeson, viziti tiun komedion, kiu donis okazon al la naskiĝo de via pasio; kaj ni bone nin gardis paroli pri tiu ĉi okazintaĵo.

Kleanto. Mi ja ankaŭ ne alvenis ĉi tien kiel Kleanto aŭ kiel ŝia amanto, sed kiel amiko de ŝia muzikinstruisto, de kiu mi ricevis la permeson diri, ke li min sendis anstataŭ si.

Toineto. Jen alvenas ŝia patro. Retiriĝu momenton kaj lasu min diri al li, ke vi ĉeestas.

Sceno dua.

Argano. Toineto.

Argano (kredante esti sola kaj ne vidante Toineton). Sinjoro Purgono rekomendis al mi, promeni matene en mia ĉambro dek-du fojojn tien kaj reen; sed mi forgesis, lin demandi, ĉu li opinias laŭlonge aŭ laŭlarĝe.

Toineto. Sinjoro Argano, jen estas...

Argano. Parolu mallaŭte, friponino, vi ekmosvos mian tutan cerbon, kaj vi ne atentis, ke oni ne devas paroli tiel laŭte antaŭ malsanuloj.

Toineto. Mi volis diri al vi, sinjoro . . .

Argano. Parolu mallaŭte, mi al vi ordonas!

Toineto. Sinjoro . . . (Ŝi ŝajnis paroli.)

Argano. Nu?

Toineto. Mi diras al vi, ke . . . (Ŝi plue ŝajnis paroli.)

Argano. Kion vi deziras?

Toineto (laŭte). Mi diris, ke jen estas sinjoro, kiu deziras paroli kun vi.

Argano. Enlasu lin! (*Toineto* geste petas *Kleanton* alproksimiĝi.)

Sceno tria.

Argano. *Kleanto.* *Toineto.*

Kleanto. Sinjoro . . .

Toineto (al *Kleanto*). Ne parolu tro laŭte, por ke vi ne ekmovu la cerbon de sinjoro.

Kleanto. Mi tre ĝojas, sinjoro, trovi vin leviĝinta, kaj vidi, ke vi pli bone fartas.

Toineto (ŝajnigante esti kolera). Kiel! ke li pli bone fartas! Tute malĝuste. Sinjoro ĉiam malbonfartas.

Kleanto. Mi aŭdis, ke sinjoro pli bone fartas, kaj mi trovas lian vidon bona.

Toineto. Kion vi volas diri per via „bonan vidon“? Sinjoro havas tre malbonan vidon, kaj estas impertinentuloj, kiuj diris al vi, ke li pli bone fartas. Neniam li tiel malbone fartis.

Argano. Ŝi estas prava.

Toineto. Li marŝas, dormas, manĝas kaj trinkas tute kiel aliaj, sed tio ne malhelpas, ke li estas tre malsana.

Argano. Tio estas vero.

Kleanto. Mi treege ĉagreniĝas pri tio, sinjoro. Mi alvenas en nomo de l'kantinstruisto de fraŭlino via filino; li estis devigata iri al la kamparo dum kelke da tagoj; kaj ĉar mi estas lia intima amiko, li min sendis, por daŭrigi anstataŭ li ŝiajn lecionojn, por ke la interrompo ne ŝin igu forgesi, kion ŝi jam estas lerninta.

Argano. Tre bone. (Al Toineto) Alvoku Angelikon.

Toineto. Sinjoro, mi opinias ĝin pli bona, konduki sinjoron en ŝian ĉambron.

Argano. Ne, igu ŝin alveni.

Toineto. Li ne povos ŝin instrui, kiel estas necese, se ili ne estas apartaj.

Argano. Do, do.

Toineto. Sinjoro, tio nur surdigos vin; en via stato la plej malgranda bruo sufiĉos, por vin emocii kaj ekmovi al vi la cerbon.

Argano. Ne, ne, mi tre ŝatas muzikon, kaj tre ĝojos se . . . Ha, jen ŝi estas. (Al Toineto) Iru vi, por vidi, ĉu mia edzino jam sin vestis.

Sceno kvara.

Argano. Angeliko. Kleanto.

Argano. Alvenu, mia filino, via muzikinstruisto iris al kamparo kaj sendis tiun ĉi sinjoron, por ke li vin instruu anstataŭ li.

Angeliko (rekoninte Kleanton). Ha, ĉielo!

Argano. Kio okazis! Pro kio tiu ĉi surprizo?

Angeliko. Estas . . .

Argano. Kio? Kio vin emocias tiamaniere?

Angeliko. Estas, mia patro, surpriza afero, kiu tie ĉi okazas.

Argano. Kiel?

Angeliko. Pasintan nokton mi songis, ke mi estis en kiel eble plej granda mizero; tiam eka-peris viro, tute simila al tiu sinjoro; mi petis lin pri helpo, kaj li min liberigis de mia embaraso. Mia surprizo do estis granda, neatendite lin revidi antaŭ mi, lin, kiun mi memoris la tutan nokton.

Kleanto. Tiu ne estas plendinda, kiu okupadas viajn pensojn en dormo aŭ maldormo; mia feliĉo sendube estus granda, se vi estus en ia embaraso kaj dignigus min, vin liberigi de ĝi; kaj nenio ekzistas, kion mi ne farus, por . . .

Sceno kvina.

Argano. Angeliko. Kleanto. Toineto.

Toineto (al Argano). Je mia fido, sinjoro, de nun mi estos sur via flanko: kaj mi reprenas ĉion, kion mi hieraŭ diris. Jen estas sinjoro Diaforuso patro kaj sinjoro Diaforuso filo, kiuj volas vin viziti. Kiel bone vi nun estos bofiligata! Vi nun vidos la plej bonan kaj spritan junulon en la mondo. Li nur diris al mi du vortojn, kiuj min ravis; kaj via filino estos ĉarmita de li.

Argano (al Kleanto, kiu ŝajnigas esti forironta). Ne do foriru, sinjoro. Mi estas edzigonta mian filinon, kaj ĵus oni volas alkonduki al ŝi ŝian supozitan edzon, kiun ŝi ankoraŭ ne vidis.

Kleanto. Vi donas al mi grandan honoron, sinjoro, permesante al mi, esti atestanto de tiel agrabla intervidiĝo.

Argano. Li estas la filo de lerta kuracisto, kaj la edziĝo okazos post paso de kvar tagoj.

Kleanto. Tre bone.

Argano. Sciigu tion al ŝia muzikinstruisto, por ke li aperu ĉe la edziĝfestoj.

Kleanto. Mi ne tion preterlasos.

Argano. Ankaŭ vi estas invitata.

Kleanto. Vi faras al mi grandan honoron.

Toineto. Nu, iru flanken; jen ili estas.

Sceno sesa.

Sinjoro Diaforuso. Tomaso Diaforuso. Argano. Angeliko. Kleanto. Toineto. Lakeoj.

Argano (metas la manon al sia ĉapo, ne ĝin deprenante). Sinjoro Purgono, sinjoro, malpermesis al mi, malkovri la kapon. Vi ja ankaŭ estas kuracisto kaj konas la sekvojn.

Sinjoro Diaforuso. Ĉiuj niaj vizitoj nur celas, alporti helpon al la malsanuloj kaj ne, havigi al ili maloportunaĵojn. (*Argano* kaj *S-ro Diaforuso* parolas samtempe.)

Argano. Mi akceptas, sinjoro —

S-ro Diaforuso. Ni alvenas, sinjoro —

Argano. Kun granda ĝojo —

S-ro Diaforuso. Mia filo Tomaso kaj mi —

Argano. La honoron, kiun vi al mi faras —

S-ro Diaforuso. Por montri al vi, sinjoro, —

Argano. Kaj mi estus dezirinta —

S-ro Diaforuso. La ravon, nin plenigantan —

Argano. Ke mi estus povinta alveni al vi —

S-ro Diaforuso. Pri la favoro, elmontrita al ni —

Argano. Por certigi ĝin al vi;

S-ro Diaforuso. Ke vi bonvolis fari al ni —

Argano. Sed vi scias, sinjoro —

S-ro Diaforuso. La honoron, sinjoro —

Argano. Ke estas malfeliĉa malsanulo —

S-ro Diaforuso. Ligiĝi kun ni —

Argano. Kiu ne povas fari ion alian —

S-ro Diaforuso. Kaj por certigi al vi —

Argano. Ol diri al vi tie ĉi —

S-ro Diaforuso. Ke ni en ĉiuj aferoj de nia metio —

Argano. Ke li ne preterlasos iun ajn okazon —

S-ro Diaforuso. Kiel ankaŭ en ĉiu alia afero —

Argano. Konigi al vi, sinjoro —

S-ro Diaforuso. Ni ĉiam estos pretaj, sinjoro —

Argano. Ke li estas via sindona servanto.

S-ro Diaforuso. Montri al vi nian fervoron. (Al sia filo.) Nu, Tomaso, proksimiĝu; faru viajn komplimentojn.

Tomaso D. (al sia patro). Ĉu ne decas, komenci je la patro?

S-ro Diaforuso. Jes!

Tomaso D. (al Argano). Sinjoro, mi salutas, rekonas, amegas kaj respektegas en vi duan patron, sed duan patron, al kiu mi riskas diri, ke mi ŝuldas al li pli ol al la unua. La unua min estas naskiginta, sed vi, vi min estas elektinta. Li min akceptis pro neceso, sed vi min akceptis pro afableco. Kion mi posedas de li, tio estis faraĵo de lia korpo, sed kion mi ricevos de vi, estas ago de via volo; kaj ju pli superaj la spiritaj kapablecoj estas ol la korpaj, des pli multe mi ŝuldas al vi, kaj des pli valora

estas al mi la estonta filiĝo, pro kiu mi hodiaŭ jam antaŭe prezentas al vi miajn tre humilajn kaj tre respektajn sindonesprimojn.

Toineto. Vivu la lernejoj, kiuj estigis tian lertan homon.

Tomaso D. (al sinjoro Diaforuso). Ĉu mia parolo estis bona, mia patro?

S-ro Diaforuso. Bonega.

Argano (al Angeliko). Nu, salutu sinjoron.

Tomaso D. (al sia patro). Ĉu mi povas kisi?

S-ro Diaforuso. Jes, jes!

Tomaso D. (al Angeliko). Sinjorino, justece la ĉielo donacis al vi la nomon de bopatrino, ĉar oni

Argano (al Tomaso D.). Tio ne estas mia edzino; estas mia filino, al kiu vi parolas.

Tomaso D. Kie do ŝi estas?

Argano. Ŝi estas tuj alvenonta.

Tomaso D. (al sia patro). Ĉu mi atendos, ĝis kiam ŝi estos alveninta?

S-ro Diaforuso. Intertempe faru viajn komplimentojn al fraŭlino.

Tomaso D. Fraŭlino, same kiel la Memnon'a statuo naskis sonon harmonian, ektuŝite de la radioj de la suno, tiel mi min sentas vivigita de dolĉa ĝojego ĉe la apero de la suno de via beleco; kaj kiel la naturistoj estas observintaj, ke la floro „heliotropo“ senĉese sin turnas al

tiu ĉi tagastro, mia koro de nun sin turnos al la brilaj steloj de viaj adorindaj okuloj, kiel al sia unika poluso. Permesu do, fraŭlino, ke mi hodiaŭ alpendigas al la altaro de viaj ĉarmoĵoj la oferdonon de tiu ĉi koro, kiu ne deziras kaj dezi-regas alian honoron, ol esti, dum sia tuta vivo, fraŭlino, via tre humila, tre obeema kaj tre fidela servanto kaj edzo.

Toineto. Oni do komprenas, kion signifas studado, kaj kiajn belegajn parolojn oni lernas deklami.

Argano (al Kleanto). Nu, kion vi diras pri tio?

Kleanto. Ke sinjoro plenumas mirindaĵojn; se li estas tiel same bona kuracisto, kiel li estas oratoristo, estos granda plezuro, aparteni al liaj pacientoj.

Toineto. Certe; estos mirindaĵo, se li faros tiel same bonajn kuracadojn, kiel li faras belajn paroladojn.

Argano. Rapiĉu. Alportu mian seĝon kaj sidilojn por la aliaj. (La lakeoj prezentas sidilojn.) Eksidu tien, mia filino. (Al sinjoro Diaforuso.) Vi vidas, sinjoro, ke ĉiu admiras sinjoron vian filon, kaj mi juĝas vin tre feliĉa pro tia filo.

S-ro Diaforuso. Malgraŭ ke mi estas lia patro, mi povas diri, ke mi havas kaŭzon, esti kontenta je li, kaj ke ĉiuj, kiuj lin vidas, lin konsideras kiel naivan junulon. Neniam li havis

vivan fantazion, nek la fajran spiriton, kiun oni rimarkas ĉe aliaj. Sed ĝuste tio igis min ĉiam antaŭdiri lian sagacon, taŭgan kvaliton por la ekzercado de nia arto. Estante juna, li neniam estis, kiel oni diras, petola kaj vigla; kontraŭe li ĉiam sin montris dolĉa, pacema kaj silentema, malparolema knabo, kiu neniam diris unu vorton kaj neniam ludis kun siaj kamaradoj tiujn ludojn, kiujn oni nomas infanaj. Oni havis la plej grandan penon, lernigi al li legadon, kaj estante naŭjara, li ankoraŭ ne komprenis la literojn. Bone, mi diris al mi mem, la prokrastemaj arboj estas tiuj, kiuj portas kutime la plej bonajn fruktojn. Sur marmoron oni gravuras multe pli malfacile ol sur sablon, sed la skribaĵo estas ankaŭ pli daŭrebla; kaj tiu malrapideco de percepto, tiu pezeco de la fantazio, estas signo de venonta bona juĝpovo. Sendite de mi en gimnazion, li renkontis multajn malfacilaĵojn, li kontraŭbatalis ilin, kaj liaj regentoj certigis ĉiam al mi lian diligentecon kaj persistecon. Fine, per konstanta frapado de l'fero li glore atingis sian licencion; kaj sen vanteco mi povas diri, ke depost du jaroj, kiam li estis en universitato, neniu ajn kandidato tiom bruus, kiom li en ĉiuj disputadoj de nia lernejo. Li tie sin igis timinda; ĉar en ĉiu akto li argumentas ĝis la morto por la kontraŭa tezo. Li estas forta disputanto, persista kiel Turko pri

siaj principoj, neniam li forlasas sian opinion kaj daŭrigas rezonadon ĝis la lastaj anguletoj de la logiko. Sed, kio plaĉas al mi plej multe, kaj en kio li sekvas mian ekzemplon, estas tio, ke li blindule sin ligas al la opinioj de niaj antikvuloj, kaj ke li neniam volis kompreni, nek aŭdi la motivojn kaj la eksperimentojn de la supozitaj eltrovaĵoj de nia jarcento, tuŝante la sangiradon kaj aliajn opiniojn de l'sama faruno (speco).

Tomaso D. (tirante el sia poŝo grandan disertacion en formo de rulo, kiun li prezentas al Angeliko). Mi defendis tezon, kontraŭ la sangiradistoj, kiun mi kun permeso de sinjoro (salutante Arganon) riskas prezenti kaj dediĉi al fraŭlino kiel unuan produktajn de mia spirito.

Angeliko. Sinjoro, tio estas por mi senutila meblaĵo, kaj mi ne estas kapabla, ĝin prijuĝi.

Toineto (ekkaptante la rulon). Donu nur, donu, oni ĝin tre bone povas uzi kiel bildon ĝi bone taŭgos por ornamo nian ĉambron.

Tomaso D. (ree salutante Arganon). Kun permeso de sinjoro, mi ankaŭ invitas vin, fraŭlino, por vin amuzi, en unu el la plej proksimaj tagoj, ĉeesti la dissekcadon de virino, pri kio mi devas rezoni.

Toineto. Tiu amuzo estos agrabla. Aliaj invitas siajn amatinojn al komedio; sed prezenti dissekcion estas unu el la plej ĝentilaj aferoj.

S-ro Diaforuso. Cetere, rilate al la kvalitoj taŭgaj por edziĝo kaj multobligo, mi certigas al vi, ke, laŭ la reguloj de niaj doktoroj, li estas tia, kian oni nur povas deziri, ke li posedas en laŭdinda grado la povon multnaskigantan, kaj ke li havas la korpstaton, kiu lin kapablas, naskigi infanojn bone preparitajn.

Argano. Ĉu vi ne intencas, sinjoro, lin alkonduki al la kortego, por havigi al li oficon de kuracisto?

S-ro Diaforuso. Sincere dirite, nia metio ĉe la grandaj neniam ŝajnas al mi agrabla, kaj mi ĉiam trovis ĝin pli bona, ke ni aliaj restadas ĉe la publiko. La publiko estas oportuna. Oni ne bezonas respondi pri siaj agoj al iu ajn, kaj, supoze ke oni nur sekvas la kutimajn regulojn de l'arto, oni ne bezonas ĉagreniĝi pri tio, kio eble okazos. Sed ĉe grandaj nia situacio estas multe pli malagrabla; kiam ili malsanas, ili nepre postulas, ke iliaj kuracistoj ilin resanigu.

Toineto. Tio ja estas amuziga; ĉu ne estas impertinente, postuli de vi, sinjoroj kuracistoj, ke vi ilin resanigu? Pro tio vi ne estas ĉe ili; vi nur tie estas, por ricevi viajn honorariojn, kaj por doni al ili kuracilojn; la resaniĝo estas ilia propra afero.

S-ro Diaforuso. Tio estas vero. Ni nur estas devigitaj, kuraci la homojn laŭ la reguloj.

Argano (al *Kleanto*). Igu do, sinjoro, mian filinon, iom kanti antaŭ la ĉeestantaro.

Kleanto. Mi atendis nur vian ordonon, sinjoro; mi intencis, por amuzi la ĉeestantojn, kanti kune kun fraŭlino, scenon el iu antaŭ ne longe verkita, malgranda opero. (Al *Angeliko*, donante al ŝi paperfolion.) Jen, fraŭlino, estas via partio.

Angeliko. Mi

Kleanto (mallaŭte al *Angeliko*). Ne kontraŭstaru, se plaĉos; kaj lasu nur min komprenigi al vi, kio okazos en la sceno, kaj kion ni kantdeklamos (Laŭte). Mi ja ne havas voĉon por kanti, sed tie ĉi sufiĉos, ke mi igas min komprenebla, kaj vi bonvolas min senkulpigi pro la neceseco, esti devigita, igi kanti fraŭlinon.

Argano. Ĉu la versaĵoj estas belaj?

Kleanto. Ĝuste dirite, tio estas senprepara opereto; kaj vi nur aŭdos prozon laŭtaktigitan, kvazaŭ liberajn versaĵojn, tiajn, kiajn pasio kaj neceseco povas inspiri al personoj, kiuj improvizas.

Argano. Tre bone. Ni aŭdu.

Kleanto. Jen estas la objekto de la sceno. Atente aŭskultante ĵus komenciĝintan teatraĵon, unu juna paŝtisto estis eltirata el sia atenteco per bruoj, kiun li aŭdis en sia proksimeco. Li sin turnas kaj vidas brutulon, ofendantan paŝtistinon per malrespektaj paroloj. Komence li inte-

resiĝis je sekso, al kiu ĉiuj homoj ŝuldas respekton; kaj, doninte al la brutulo punon pro lia insulto, li iras al la paŝtistino kaj ekvidas junulinon, kiu verŝis belegajn larmojn el du el la plej ĉarmaj okuloj, kiujn li iam vidis. Ho ve! li diris al si mem: Ĉu iu povas esti kapabla, insulti tian amindan personon? Kaj kiu nehumana, kiu barbara homo ne estus kortuŝita per tiaj larmoj! Li penas ilin haltigi, tiujn ĉi larmojn, kiujn li trovas tiel belaj, kaj la paŝtistino siavice samtempe penas, lin danki pro lia malgrava servo, sed je maniero tiel ĉarma, tiel dolĉa kaj tiel pasia, ke la paŝtisto ne povas kontraŭstari; kaj ĉiu vorto, ĉiu rigardo estas flamega sago, per kiu lia koro sin sentas trafita. Ĉu io ekzistas, li diris, kio povas meriti la afablajn parolojn de tia danko? Kaj kion oni ne farus, kiajn servojn, kiajn danĝerojn oni ravite ne serĉus, por akiri al si, eĉ nur por momento, la kortuŝantajn dolĉaĵojn de animo tiel dankema. La tutan teatraĵon li preterlasas, ne ĝin iel atentante; sed li plendas, ke ĝi estas tro mallonga, ĉar post ĝia finiĝo li devas adiaŭi al sia adorinda paŝtistino; kaj de tiu unua vido, de tiu unua momento li sentas la tutan forton, kiun nur multjara amo povas influi. Tuj li ankaŭ sentas ĉiujn dolorojn de la foresto, kaj li sin sentas malfeliĉa, ne plu vidonte tion, kion li apenaŭ vidis. Li faras ĉion,

por havigi al si tiun ĉi vidon, kies dolĉa rememoro lin plenigas nokte kaj tage, sed la forta devigo, per kiu oni ĉirkaŭas la paŝtistinon, forprenas de li la eblecon, ŝin revidi. La fortego de lia pasio elvokas en li la decidon, peti pri la mano de la adorinda belulino, sen kiu li ne plu povas vivi; li ricevas de ŝi la permeson al tio per bileto, kiun li lerte scias enmanigi al ŝi. Sed samtempe oni sciigas al li, ke la patro de tiu ĉi belulino decidis ŝian edziĝon kun aliulo, kaj ke ĉio estas preparata por la festeno. Pripensu: kia kruela frapo por la koro de la malgaja paŝtisto! Mortiga doloro lin atakas. Li ne povas elporti la teruran penson, vidi ĉion, kion li amas, inter la brakoj de aliulo; kaj lia malesperanta amo igas lin trovi rimedon, por sin enŝteli en la domon de la paŝtistino, por sciigi ŝiajn sentojn, kaj por aŭdi per ŝi mem, kia sorto lin minacas. Li tie ekvidas la preparaĵojn al ĉio, kion li timas; li tie vidas la malindan konkuranton, kiun patra kaprico kontraŭmetas al lia flama amo; li vidas lin triumfanta, tiun ridindan kontraŭulon, proksima al la aminda paŝtistino, kaj al certa venko. Tiu ĉi vido lin plenigas de tia kolero, ke li apenaŭ povas kvietiĝi. Li ĵetas dolorajn rigardojn sur ŝin, kiun li adoras; kaj lia respekto kaj la ĉeestado de ŝia patro igas lin paroli kun ŝi nur per la okuloj. Sed fine li

rompas ĉiun devigon, kaj la pasio de lia amo
lin devigas paroli al ŝi jene: (Li kantas.)

Ho, Filiso, tro, tro multe mi suferas,
ne silentu plu, malkovru viajn sentojn;
diru, ĉu mi povas vivi,
ĉu mi devas malesperi.

Angeliko (kantante). Vi, Tirciso, vidas min
melankolia,

do ne timu la edziĝajn pretigadojn;
rigardante vian kortuŝantan amon,
mi al ĉielo preĝos, ke li al ni helpu.

Argano. Mirinde! Mi ĝis nun ne sciis, ke
mia filino estas kapabla, kanti tiel unuavide, ne
ŝanceliĝante.

Kleanto. Ha Filiso, mia karulino, diru,
ĉu Tircison vi nur iomete amas;
por ke mi al ĉielo sendu mian dankon
pro la nedirebla feliĉego mia.

Angeliko. Mi ne povas kontraŭstari mian koron;
malgraŭ ĉio mia amo estas via.

Kleanto. Ĉielo! Kia aloganta vorto!

Ĉu ne trompis min oreloj miaj?

Ha, rediru ĝin, Filiso kara,

por ke mi ne dubu plu pri tio,

Angeliko. Jes, Tirciso mia, vin mi amas.

Kleanto. Ha, mi dankas vin korege, Finjo.

Angeliko. Eternege restos al vi mia amo.

Kleanto. Ne laciĝu kaj rediru ĝin cent fojojn,

Angeliko. Vin, Tirciso, amas mi, amegas,
amas kaj amegas vin senfine.

Kleanto. Dioj, reĝoj, posedante tutajn mondojn,
Ĉu feliĉo via nur similas mian?

Sed, Filiso, unu premas mian koron
forte, konkuranton havi kaj rivalon. . .

Angeliko. Mi malamas lin pli ol la tujan morton,
lia vido, enuiga babilado
malĝojigas mian kiel vian koron.

Kleanto. Sed la patro via volas vin subigi.

Angeliko. Mi, Tirciso, vere mi preferus, morti
ol konsenti tiun stultan edziniĝon;
jes, karulo mia, mi preferus morti.

Argano. Kaj kion diris al tio la patro?

Kleanto. Li nenion diris.

Argano. Kia malprudenta patro, kiu permesas
tiajn malsaĝaĵojn, ne ion dirante.

Kleanto (daŭrigonte kanti) Ha, mia amo. . .

Argano. Ne, ne, sufiĉas nun. Tiu komedio
estas tre malbona ekzemplo. La paŝtisto Tirciso
estas impertinentulo, kaj la paŝtistino Filiso estas
senhontulino, tiel parolante en ĉeesto de sia patro. (Al
Angeliko.) Montru do al mi tiun paperfolion. Ha,
ha, kie do estas la parolitaj vortoj? Jen nur
estas skribitaj notoj!

Kleanto. Ĉu vi do ne scias, ke antaŭ ne
longe oni elpensis, skribi la vortojn kune kun la
notoj mem.

Argano. Nu bone; mi estas via servanto, sinjoro, ĝis revido! Ni tute ne bezonas aŭdi vian impertinentan operon.

Kleanto. Mi intencis, vin amuzi per tio.

Argano. Malsaĝaĵoj ne amuzas. Ha, jen estas mia edzino.

Sceno tria.

Belino. Argano. Angeliko.

S-ro kaj Tomaso Diaforuso. Toineto.

Argano. Karulino, jen estas la filo de sinjoro Diaforuso.

Tomaso D. Sinjorino, juste la ĉielo donis al vi la nomon „bopatrino“, ĉar oni ekvidas sur via vizaĝo...

Belino. Mi tre ĝojas, ke mi alvenis ĝustatempe, por havi la honoron, vin vidi.

Tomaso D. Ĉar oni ekvidas sur via vizaĝo... ĉar oni ekvidas sur via vizaĝo... sinjorino, vi min interrompis en la mezo de mia periodo, kaj tio konfuzis mian memoron.

S-ro Diaforuso. Tomaso, rezervu tion por alia fojo.

Argano. Mi dezirus, mia kara, ke vi estu estinta ĉi tie antaŭ ne longe.

Toineto. Ha, sinjorino, vi multe perdis, ke vi maltrafis la duan patron, la Memnon'an statuon kaj la tiel nomatan floron „heliotropo“.

Argano. Nu, mia filino, donu la manon al la sinjoro kaj promesu fidon al li, kiel al via edzo.

Angeliko. Mia patro!

Argano. Nu? Mia patro? Kion tio volas diri?

Angeliko. Mi petas, ne rapidigu la aferojn. Lasu al ni almenaŭ la tempon por konatiĝi reciproke kaj por vidi, ĉu naskos en ni la por perfekta unuiĝo tiel necesega inklinemo.

Tomaso D. Rilate min, fraŭlino, mi povas diri, ke ĝi jam naskiĝis en mi, kaj ke mi ne plu bezonas ĝin atendi.

Angeliko. Se vi estas tiel rapidega, sinjoro, mi tion rilate min ne povas certigi; kaj mi devas al vi konfesi, ke via indeco ankoraŭ ne sufiĉe impresis mian animon.

Argano. Nu, tio sin aranĝos, kiam vi estos geedzoj.

Angeliko. Ho, mia, paĉjo! Lasu al mi tempon, mi petas. Edziĝo estas ĉeno, kiun oni ne perforte devas almeti al koro; kaj se sinjoro estas honesta homo, li ne volos akcepti fraŭlinon, kiu nur devigite al li apartenus.

Tomaso D. „Nego consequentiam“ (mi neas la konsekvencon); mi povas esti honesta homo kaj tamen voli akcepti vin el la manoj de sinjoro via patro.

Angeliko. Sed ne ekzistas pli malbona rimedo, por sin igi amata de iu, ol lin devigi.

Tomaso D. Ni legas en la skriboj de la anti-kvuloj, fraŭlino, ke ili kutimis, perforte rabi el la domoj de la gepatroj la filinojn, kiujn oni estis edziĝontaj, por ke ne ŝajnu, kvazaŭ ili flugus propravole en la brakojn de la viroj.

Angeliko. Preterlasu la antikvuloj, sinjoro, ili ne estas aŭtoritataj por mi; ni estas homoj nuntempaj. Tiaj grimacoj ne estas necesaj en nia jarcento, kaj kiam edziĝo al ni plaĉas, oni ne bezonas nin fortiri al la altaro. Pacienciĝu; se vi min amas, sinjoro, vi devas voli ĉion, kion mi volas.

Tomaso D. Jes, fraŭlino, nur kun escepto de la propraj interesoj de tiu ĉi mia amo.

Angeliko. Sed la plej granda rekonilo de l'amo do estas, submetiĝi sub la volon de tiu, kiun oni amas.

Tomaso D. „Distinguo“ (mi distingas), fraŭlino. En tio, kio ne rilatas ŝian posedon, „concedo“ (mi koncedas); sed en tio, kio rilatas ĉi tiun, „nego“ (mi neas).

Toineto (al Angeliko). Vi vane rezonos; tiu sinjoro estas nove bakita en la gimnazio, kaj li ĉiam rebatos vian atakon. Pro kio vi kontraŭstaras kaj rifuzas la gloron, esti alligita al la „Scienca Fakultato“?

Belino. Ŝi eble havas alian inklinemon en kapo.

Angeliko. Se mi tion havus, sinjorino, ĝi estus tia, ke prudento kaj honesteco povus tion permesi al mi.

Argano. Hola! Mi ja ludas tie ĉi ridindan rolon.

Belino. Anstataŭ vi, mia filo, mi ne ŝin devigus edziniĝi; kaj mi bone scias, kion mi farus.

Angeliko. Mi scias, sinjorino, kion mi volas diri, kaj kiom vi interesiĝas je mi; sed viaj konsiloj eble ne estos sufiĉe prosperaj, por esti plenumataj.

Belino. Komprenoble, ĉar filinoj tre saĝaj kaj tre honestaj, kiel vi, moke rifuzas, obeeme submetiĝi sub la volon de sia patro. Tio okazis iame.

Angeliko. La devo de filino estas limigita, sinjorino, kaj prudento kaj leĝoj ne ĝin etendas al ĉiuj aferoj.

Belino. Tio estas, ke vi ja intencas edziniĝi, sed ke vi volas elekti edzon laŭ via gusto.

Angeliko. Se mia patro ne volas doni al mi edzon, kiu al mi plaĉas, mi lin petegos, ke li min ne devigu, edziniĝi je alia, kiun mi ne povas ami.

Argano. Sinjoroj, mi petas vian pardonon pro ĉio, kio tie ĉi okazis.

Angeliko. Ĉiu kiu edziĝas, havas sian celon. Rilate min, mi nur deziras al mi edzon, por vere lin ami kaj por aparteni al li la tutan mian vivon;

jen, kial mi procedas en tiu ĉi afero iom singarde. Ekzistas aliaj, kiuj edziniĝas sole, por fortiĝi de la aŭtoritato de la gepatroj kaj por ebligi al si, vivi laŭ sia volo. Ekzistas aliaj, sinjorino, kiuj igas edziniĝon sola profitdona komerco, kiuj edziniĝas nur por akiri vidvinajn bienojn, por sin riĉigi per la morto de tiuj, kiujn ili edziniĝas, kaj kiuj senskrupule kuras de unu edzo al alia, por propriigi al si iliajn postlasaĵojn. Tiaj virinoj ja ne faras tiajn ceremoniojn, kaj konsideras la personon kiel apudaĵon.

Belino. Mi vin trovas hodiaŭ tre rezonema, kaj mi tre dezirus sciiĝi, kion vi volas diri per tio.

Angeliko. Mi, sinjorino? Kiel mi povus diri ion alian, ol mi estas dirinta?

Belino. Vi estas tiel stulta, mia kara, ke oni ne plu povas vin elporti.

Angeliko. Vi eble forte deziras, sinjorino, min devigi, respondi al vi per impertinentaĵoj, sed mi certigas al vi, ke mi ne faros al vi tiun plezuron.

Belino. Via senhonteco estas nekomparebla.

Angeliko. Ne, sinjorino, vi vane klopodas.

Belino. Kaj vi havas ridindan fierecon, impertinentan tromemfidon, kiuj igas ĉiujn levi la ŝultrojn.

Angeliko. Ĉio tio, sinjorino, ne povas al vi utili; mi estos saĝa spite de vi; kaj por forpreni

de vi la esperon, povi efektiviĝi vian volon, mi foriĝos de viaj okuloj.

Sceno oka.

Argano. Belino. S-ro kaj Tomaso Diaforuso. Toineto.

Argano (al Angeliko, kiu eliras). Atentu! Ne restos al vi alia elekto: aŭ vi edziniĝos je tiu ĉi sinjoro post kvar tagoj, aŭ vi iros en monaĥinejon. (Al Belino.) Ne malkvietiĝu, mi ĉion aranĝos.

Belino. Bedaŭrinde mi devas vin forlasi, mia fileto, mi havas aferojn en la urbo, de kiuj mi ne povas min liberigi. Mi baldaŭ revenos.

Argano. Iru, mia kara, kaj vizitu vian notarion, por ke li rapide plenumu, kion vi scias.

Belino. Adiaŭ, mia amiketo.

Argano. Adiaŭ, amatino.

Sceno naŭa.

Argano. S-ro kaj Tomaso Diaforuso. Toineto.

Argano. Jen edzino, kiu min amas. Tio estas tute nekredebla.

S-ro Diaforuso. Sinjoro, mi volas adiaŭi al vi.

Argano. Diru do antaŭe, sinjoroj, mi petas, kiel mi fartas.

S-ro Diaforuso (palpante la pulson de Argano). Nu, Tomaso, prenu vi la alian brakon de sinjoro,

por ke mi vidu, ĉu vi scias doni bonan juĝon pri lia pulso. Quid dicis? (Kion vi diras?)

Tomaso D. Dico (Mi diras), ke la pulso de sinjoro estas la pulso de homo, kiu ne bonfartas.

S-ro Diaforuso. Bone.

Tomaso D. Ke ĝi estas diuruskula, por ne diri malmola.

S-ro Diaforuso. Tre bone.

Tomaso D. Repuŝanta.

S-ro Diaforuso. Trafite.

Tomaso D. Eĉ iom saltanta.

S-ro Diaforuso. Bonege.

Tomaso D. Kiu montras malordon en la parenkimo splenika (liena), tio estas en la lieno.

S-ro Diaforuso. Tre bone.

Argano. Ne, sinjoro Purgono diras, ke mia hepato malsanas.

S-ro Diaforuso. Nu jes; kiu diras parenkimo, diras ambaŭ, pro la intima simpatio, kiu ekzistas inter ili ambaŭ, pere de la „vas breve“, de „l'pilorio“ kaj ofte de la „meato ĥolidoka“. Sendube li al vi ordonis manĝi multegon da rostaĵo?

Argano. Ne, nenion ol buljonon.

S-ro Diaforuso. Ha jes, rostaĵo, bolitaĵo, sama afero. Li vin kuracas tre prudente, kaj vi ne povas enveni en pli bonajn manojn.

Argano. Kiom da saleroj oni devas preni al ovo?

S-ro Diaforuso. Ses, ok, dek pare, kiel en medikamentojn nepare.

Argano. Ĝis revido, sinjoroj.

Sceno deka.

Belino. Argano.

Belino. Antaŭ ol eliri, mi donos al vi averton pri afero, kiu postulos vian atenton. Preterpasante la ĉambron de Angeliko, mi ĵus rimarkis ĉe ŝi junan sinjoron, kiu, min rigardante, tuj foriĝis.

Argano. Junan sinjoron ĉe mia filino?

Belino. Jes, via filineto Luizo ĉeestis, ŝi povos diri al vi, kio okazis.

Argano. Sendu ŝin ĉi tien, patrineto, sendu ŝin ĉi tien. Ho, la senhontulino. (Sola.) Nun mi komprenas ŝian malcedemon.

Sceno dekunua.

Luizo. Luizo.

Luizo. Kion vi deziras, mia paĉjo? Mia duonpatrino diris al mi, ke vi deziras min vidi.

Argano. Jes, venu ĉi tien; pli proksime. Turnu vin. Levu la okulojn. Rigardu min. He?

Luizo. Kio, mia paĉjo?

Argano. Nu?

Luizo. Kio?

Argano. Ĉu vi ne havas ion por diri al mi?

Luizo. Mi rakontos al vi, se plaĉos, por vin malenuigi, la rakonton pri „la Haŭto de la Azeno“ aŭ eble la fablon pri „la Korvo kaj la Vulpo“, kiujn oni antaŭ ne longe lernigis al mi.

Argano. Tio ne estas tio, kion mi postulas.

Luizo. Kion do?

Argano. Ha, ruzulino, vi bone scias, kion mi volas diri.

Luizo. Pardonu min, mia paĉjo.

Argano. Ĉu vi tiel obeas vian patron?

Luizo. Kio?

Argano. Ĉu mi ne rekomendis al vi, tuj diri al mi ĉion, kion vi vidis?

Luizo. Jes, mia paĉjo.

Argano. Ĉu vi tion faris?

Luizo. Jes, mia paĉjo, mi ĉion diris al vi, kion mi vidis.

Argano. Kaj vi nenion vidis hodiaŭ?

Luizo. Ne, mia paĉjo.

Argano. Ne?

Luizo. Ne, mia paĉjo.

Argano. Certe?

Luizo. Certe.

Argano. Ej, ej! Tiam mi ion montros al vi.

Luizo (vidante vergofaskon en la mano de Argano).
Ho, mia paĉjo!

Argano. Ha, ha, malgranda maskitino; ĉu vi nun diros al mi, ke vi vidis sinjoron en la ĉambro de via fratino?

Luizo (plorante). Mia paĉjo!

Argano (prenante Luizon per la brako). Tio ĉi lernigos vin, ne mensogi.

Luizo (sin ĵetante genuen). Ho, mia paĉjo, mi petas pri pardono; mia fratino malpermesis al mi, ĝin diri al vi; sed mi nun volas ĉion konfesi al vi.

Argano. Antaŭe mi vin vergos pro via mensogo. Poste ni pripensos la pluon.

Luizo. Pardonu min, mia paĉjo!

Argano. Ne, ne!

Luizo. Karega paĉjo, ne vergu min!

Argano. Mi vin vergos.

Luizo. Per nomo de Dio, mia paĉjo, ne vergu min!

Argano (vergonte). Nur ĉi tien!

Luizo. Ho, mia paĉjo, vi min estas vundinta! Atendu! Mi estas ĉmortonta. (Ŝi ŝajnigas esti mortinta.)

Argano. Hola! Kio estas tio? Luizo! Ho! Mia Dio! Luizo! Ho, mia filino! Ho, mi malfeliĉulo, mia kompatinda filino estas mortinta!

Kion mi faris, mi mizerulo! Ho, tiuj malbenitaj vergoj! La pesto prenu ilin! Ho, mia bedaŭrinda filino, mia malfeliĉa Luinjo!

Luizo. Nu, nu, mia paĉjo, ne ploru tiom, mi ne estas tute mortinta.

Argano. Nun vidu do tiun malgrandan ruzulinon! Nu bone, mi vin pardonos ĉi tiun fojon, supoze ke vi ĉion sciigos al mi.

Luizo. Ha jes, mia paĉjo.

Argano. Sed gardu vin; ĉar tiu ĉi malgranda fingro scias ĉion kaj diros al mi, ĉu vi mensogos.

Luizo. Jes, mia paĉjo, sed ne diru al mia fratino, ke mi ĝin diris al vi.

Argano. Ne, ne.

Luizo (rigardinte, ĉu neniu aŭskultas). Do, mia paĉjo, iu sinjoro venis en la ĉambron de mia fratino, kiam mi tie estis.

Argano. Nu pluen!

Luizo. Mi lin demandis, kion li deziras, kaj li diris al mi, ke li estas ŝia kantinstruisto.

Argano. Hm, hm! Jen la afero. (Al Luizo.) Pluen.

Luizo. Tiam alvenis mia fratino.

Argano. Pluen.

Luizo. Ŝi al li diris: Eliru, eliru, eliru. Mia Dio, eliru, vi min metos en malesperon.

Argano. Kaj tiam?

Luizo. Li ne volis eliri.

Argano. Kion li diris al ŝi?

Luizo. Mi ne scias plu, kion ĉion li diris al ŝi.

Argano. Kion ankoraŭ?

Luizo. Li parolis ĉi tion kaj tion; ke li ŝin tre amas, ke ŝi estas la plej bela junulino en la mondo.

Argano. Kaj poste?

Luizo. Kaj poste li genuiĝis antaŭ ŝi.

Argano. Kaj poste?

Luizo. Kaj poste li kisis al ŝi la manojn.

Argano. Kaj poste?

Luizo. Kaj poste alvenis mia duonpatrino, kaj li forkuris.

Argano. Ĉu tio estas ĉio?

Luizo. Jes, mia paĉjo.

Argano. Sed kion do murmuris mia malgranda fingro (metante sian fingron al sia orelo). Atendu. He! Ha! Ah! Ah! Jes, Oh! Oh! Mia malgrandfingro ja diras ion, kion vi vidis, kaj kion vi prisilentis.

Luizo. Ne, mia paĉjo, via malgrandfingro estas mensoganto.

Argano. Vi, vi, gardu vin!

Luizo. Ne, mia paĉjo, ne kredu al ĝi; li mensogas, mi ĝin certigas al vi.

Argano. Nu, bone, bone; tio montriĝos. Nun foriru kaj atentu ĉion; foriru! (Sole.) Ho! Ne

plu ekzistas infanoj! Kiaj aferoj! Mi apenaŭ havas libertempon, pripensi mian malsanon. Efektive, miaj fortoj estas malaperintaj. (Li lasas sin fali en sian seĝon.)

Sceno dekdua.

Beraldo. Argano.

Beraldo. Nu, mia frato. Kio okazis? Kiel vi fartas?

Argano. Ho, mia frato, tre malbone!

Beraldo. Kiel tre malbone?

Argano. Jes, mia malforto estas granda, nekred-eble granda.

Beraldo. Tio ja estas ĉagreniga.

Argano. Mi havas apenaŭ la forton paroli.

Beraldo. Mi alvenis, mia frato, por proponi al vi partion por mia nevino Angeliko.

Argano (kolere parolante kaj sin levante de sia seĝo). Mia frato, ne parolu al mi pri tiu ĉi sentaŭgulino. Ŝi estas friponino, impertinentulino, senhontulino, kiun mi metos en monahinejon antaŭ ol pasos du tagoj.

Beraldo. Ha, tre bone. Mi tre ĝojas, ke viaj fortoj estas iom revenantaj, kaj ke mia vizito al vi bonutilas. Nu, ni parolu pri aferoj poste. Mi kunvenigis amuzajon, kiun mi renkontis, kiu malaperigos vian ĉagrenon kaj igos vian animon

pli impresebla por miaj proponoj. Estas egiptoj, vestitaj kiel maŭroj, kiuj prezentos dancojn, intermiksitajn de kantoj, kiuj eble vin amuzos. Tio certe egalvaloros recepton de sinjoro Purgono. Eniru!

Fino de la dua akto.

Akto tria.

Sceno unua.

Beraldo. Argano. Toineto.

Beraldo. Nu, mia frato, kion vi diras pri tio? Ĉu tio ne egalvaloras dozon de kasio?

Argano. Hm! Bona kasio estas ankaŭ io bona.

Beraldo. Nu jes. Ĉu vi konsentas, ke ni iom interparolu?

Argano. Pacienĉu por momento, mia frato, mi tuj revenos.

Toineto. Atentu, sinjoro, vi ne pripensas, ke vi ne povas marŝi sen bastono.

Argano. Vi estas prava.

Sceno dua.

Beraldo. Toineto.

Toineto. Ne forlasu do, kompleze, la partion de via kompatinda nevino.

Beraldo. Mi aplikos ĉiujn rimedojn, por ke ŝi akiru, kion ŝi deziras.

Toineto. Oni devas absolute malebligi la strangan edziĝon, kiun li metis al si en la kapon; kaj mi jam ekpensis por mi mem, ĉu eble ne estus bone, enkonduki ĉi tien kuraciston, kiel nian helpanton, por naŭzi lin kontraŭ sinjoro Purgono kaj por senkreditigi tiun ĉi. Sed ĉar momente mankas al mi tia persono, mi decidiĝis, plenumi ŝercaĵon laŭ mia kapo.

Beraldo. Nu kiel?

Toineto. Estas ekpenso ridiginda. Ĝi eble estas pli prospera ol saĝa. Lasu min nur agi. Agu vi laŭ via bontrovo. Jen venas nia homo.

Sceno tria.

Argano. *Beraldo.*

Beraldo. Antaŭ ĉio, mia frato, permesu al mi, peti vin, ne ekscitiĝi dum nia interparolado.

Argano. Kompreneble ne.

Beraldo. Respondi sen ia ajn maldolĉeco pri tio, kion mi al vi diros.

Argano. Jes.

Beraldo. Kaj konsiliĝi kun mi pri la aferoj priparolotaj kun tute senpasia spirito.

Argano. Mia Dio, jes. Kia longa antaŭparolo!

Beraldo. Kiel estas eble, mia frato, ke vi, havante tiom da riĉaĵojn, kaj havante nur unu filinon, — ĉar la malgrandulinon mi ne kalkulas, —

kiel estas eble, mi diras, ke vi intencas, ŝin meti en monaĥinejon?

Argano. Kiel estas eble, mia frato, ke mi estas ĉefo de mia familio, kaj ke mi povas fari, kio al mi plaĉas?

Beraldo. Via edzino ne mankas, konsili al vi, tiamaniere liberiĝi de viaj du filinoj; kaj mi tute ne dubas, ke ŝia kompatema spirito estus tre kontentigita, se vi igus ilin du bonaj monaĥinoj.

Argano. Jen la afero! La kompatinda edzino ĉiam devas esti la iniciatantino de ĉio, ŝi devas esti kulpa en ĉiu malbono, kaj ĉiu koleras kontraŭ ŝi.

Beraldo. Ne, mia frato, ni ne parolu plu pri tio. Tiu ĉi virino certe havas la plej bonajn intencojn por via familio kaj estas libera de ĉia speco de propra intereso; ŝi montras al vi mirindan karesemon kaj al viaj infanoj nekompreneblajn inklinon kaj bonecon; tio estas vera. Ni ne parolu plu pri tio, kaj ni ree parolu pri via filino. Kial vi insistas, edzinigi ŝin kun filo de kuracisto?

Argano. Tial, mia frato, ke mi havigu al mi tian bofilon, kian mi bezonas.

Beraldo. Sed, mia frato, tio do ne estas la afero de via filino; cetere prezentiĝas al ŝi pli akceptebla partio ol tiu.

Argano. Jes, mia frato, sed tiu partio estas pli akceptebla por mi.

Beraldo. Nu, mia frato, ĉu la viro, je kiu ŝi devas edziniĝi, estas destinota por ŝi aŭ por vi?

Argano. Li estas destinota tiel por ŝi, kiel ankaŭ por mi; kaj mi volas enkonduki en nian familion tiujn homojn, kiujn mi bezonas.

Beraldo. Ĉu laŭ tiu principo vi edzinigus vian malgrandan filinon, fariĝintan granda, kun apotekisto.

Argano. Kial ne?

Beraldo. Ĉu estas eble, ke vi ĉiam volas esti ĉirkaŭita de apotekistoj kaj kuracistoj, kaj ke vi nepre volas esti malsana spite de la homoj kaj naturo.

Argano. Kion vi volas diri per tio?

Beraldo. Mi volas diri per tio, mia frato, ke mi ne konas homon pli sanan ol vi, kaj ke mi ne dezirus al mi pli bonan konstitucion ol la vian. Grava pruvilo por tio, ke vi bonfartas, kaj ke vi havas tute senmankan korpon, estas, ke malgraŭ viaj klopodoj, vi ankoraŭ ne povis sukcesi, ruinigi vian bonan korpstaton, kaj ke vi ne jam krevis per ĉiuj tiuj medikamentoj, kiujn oni igis vin engluti.

Argano. Ne, sciu, mia frato, ke ĝuste tio min konservas, kaj ke, laŭ la diro de sinjoro Purgono, mi pereus, se mi estus nur tri tagojn sen lia helpo.

Beraldo. Se vi ne vin gardas, li baldaŭ al vi tiom helpos, ke li vin ekspedos en alian mondon.

Argano. Sed, mia frato, ni iam parolu racie. Ĉu vi do ne kredas al la medicino?

Beraldo. Ne, mia frato, mi ankaŭ ne komprenas, ke oni pro sia savo devus kredi al ĝi.

Argano. Kio? Vi ne kredas veran aferon, starigitan de la tuta mondo kaj respektigitan ĉiutempe?

Beraldo. Mi tute ne juĝas ĝin vera; kontraŭe, mi, inter ni, konsideras ĝin kiel unu el la plej grandaj malsaĝaĵoj, kiuj ekzistas inter la homaro, kaj rigardante la aferojn kiel filozofo, mi ne konas pli plezurigan arlekenaĵon, mi ne konas ion pli ridindan ol homon, kiu volas sin okupi je la kuracado de alia.

Argano. Kial do ne estus eble, mia frato, ke unu homo povus kuracadi alian?

Beraldo. Pro tio, mia frato, ke la risortoj de nia maŝino estas misteroj ĝis hodiaŭ, de kiuj la homoj nenion vidas, kaj kiujn naturo kovris per vualo tro densa por niaj okuloj.

Argano. Ĉu do, laŭ via opinio, la kuracistoj scias nenion?

Beraldo. Certe, mia frato. La plejmulto el ili posedas bonan literaturan sciadon, paroladas bone la lingvon latinan, scias nomi greke ĉiujn

malsanojn, kaj scias difini kaj dividi ilin, sed pri ties kuracado ili nenion scias.

Argano. Nu, ĉiam oni do devas konfesi, ke kuracistoj pri tiu ĉi afero scias pli ol la aliaj.

Beraldo. Ili scias, mia frato, kiel mi al vi diris, tion, per kio ili ne multon povas kuraci; kaj la tuta bonegeco de ilia arto konsistas el pompa galimatiaso (konfuza parolado) el verŝajniga babilado, kiu donas al ni vortojn anstataŭ kaŭzoj kaj promesojn anstataŭ efikoj.

Argano. Sed fine, mia frato, ekzistas do homoj tiel saĝaj kaj lertaj kiel vi, kiuj, fariĝinte malsanaj, petas helpon de la kuracistoj.

Beraldo. Tio estas atesto de homa malforteco, kaj ne de la vereco de ilia arto.

Argano. Sed la kuracistoj do devas kredi vera sian arton, ĉar ili uzas ĝin por si mem.

Beraldo. Tio estas tia; ĉar kelkaj de ili mem estas en la eraro popola, de kiu ili profitas; kaj aliaj profitas de ĝi, ne kredante ĝin. Via sinjoro Purgono ekzemple ne estas unu el la ruzaj; li estas tuta kuracisto de la kapo ĝis la piedoj, homo, kiu kredas siajn regulojn pli ol ĉiujn el-montrojn de la matematekistoj, kaj kiu ĝin konsiderus kiel krimon, se li volus ilin provi; al kiu ekzistas en la medicino nenio kaŝita, nenio duba, nenio malfacila; kaj kiu kun tia vivegeco de antaŭjuĝo, kun tia severeco de konfido, kun tia

bruteco de la senco komuna kaj de la prudento, ordonas intermiksita laksigojn kaj sangellasojn, ne ŝanceliĝante pri ilia elekto. Oni eĉ ne povas lin respondi pri tio, kion li pekas kontraŭ vi; li vin ekspedos plej bonkrede en la alian mondon; kaj kiam li vin tien ĉi ekspedas, li faros tion saman, kion li faris al siaj edzino kaj infanoj, kaj kion li farus al si mem en okazo de bezono.

Argano. Vi jam de longe lin koleris, mia frato. Sed fine, ni alvenu al la esencaĵo. Kion do fari, kiam oni malsanas?

Beraldo. Nenion, mia frato.

Argano. Nenion?

Beraldo. Nenion. Oni nur devas restadi en ripozo. La naturo, lasite al si mem, sin tiras dolĉe el la malordo, en kiun ĝi falis. Estas nia maltrankvileco, nia malpacienco, kiuj ĉion malbonigas; kaj preskaŭ ĉiuj homoj mortas sekve de siaj kuraciloj kaj ne sekve de siaj malsanoj.

Argano. Sed vi do devas konfesi, mia frato, ke oni povas helpi al tiu ĉi naturo per certaj aferoj.

Beraldo. Nu, mia frato, tio estas nur ideoj, per kiuj ni amas nin nutri; ĉiutempe enŝoviĝis en la homaron belaj ideoj, al kiuj ni kredas, ĉar ili nin flatas; kaj ĉar estus dezirinde, ke ili estu veraj. Kiam kuracisto promesas al vi, helpi, subteni, dolĉigi la naturon, depreni de ĝi, kio

ĝin malutilas, kaj aldoni al ĝi, kio mankas al ĝi, restarigi ĝin kaj remeti ĝin en plenan facilecon de ĝiaj funkcioj; kiam li promesas al vi, korekti la sangon, kvietigi la internaĵon kaj cerbon, malŝveligi la lienon, rebonigi la bruston, ripari la hepaton, plifortigi la koron, reigi kaj konservi la naturan varmon, havante sekretaĵojn por plilongigi la vivon multajn jarojn; — tiam li ĝuste rakontos al vi la romanon (la nekredeblaĵon) de la medicino. Sed kiam vi ĝin funde esploras, vi trovos nenion de ĉio tio, kiel en tiuj belaj sonĝoj, kiuj ĉe la vekigo lasas al vi nur la malplezuron, esti ilin kredinta.

Argano. Tio estas, ke la tuta scienco de la mondo estas enfermita en via kapo; kaj vi volas scii pri ĝi pli ol ĉiuj eminentaj kuracistoj de nia jarcento.

Beraldo. Viaj grandaj kuracistoj estas du specoj de homoj, laŭ iliaj paroloj kaj agoj; se vi aŭdas ilin parolantaj, ili estas la plej lertaj homoj en la mondo; kiam vi ilin vidas agantaj, ili estas la plej malklerulaj el ĉiuj homoj.

Argano. Oho! Vi estas ja eminenta instruitulo, kiel mi vidas; kaj mi dezirus, ke iu el tiuj ĉi sinjoroj ĉeestus, por ke li refutu viajn pretendojn kaj ŝtopu al vi la buŝon.

Beraldo. Mi? Mi tute ne intencas kontraŭbatali la medicinon; kaj ĉiu kredu je siaj propraj

danĝero kaj felico, ĉion, kio plaĉos al li. Kion mi diris pri tio, mi nur diris inter ni; kompreneble mi estus dezirinta, ke mi povu iom vin liberigi de la eraro, en kiu vi estas, kaj por vin amuzi, vidigi al vi, rilate tiun ĉapitron, iun el la komedioj de Molière.

Argano. Via Molière estas granda impertinentulo kun siaj komedioj; kaj mi ne ĝin trovas amuza, moki honestajn homojn, kiaj estas la kuracistoj.

Beraldo. Li ne imitas la kuracistojn, sed la ridindaĵojn de la medicino.

Argano. Kiel li povas riski, enmiksiĝi en la sciencon medicinan! Tia simplanimulo, tia impertinentulo kuraĝas moki konsiliĝojn kaj receptojn, ataki la tutan kuracistaron, kaj meti sur sian scenejon respektgindajn personojn, kiel tiujn ĉi kuracistojn.

Beraldo. Kion alian vi do volas, ke li metu sur scenejon, ol la diversajn profesiojn de la homoj? Oni ja imitas tie ĉiutage princojn kaj reĝojn, kiuj devenas de tiel same bonaj familioj kiel tiuj sinjoroj.

Argano. Infero kaj diablo! Se mi estus medicinisto, mi min venĝus pro lia impertinenteco, kaj kiam li estus malsana, mi lasus lin morti, ne helpante lin. Vane li povus fari kaj diri, kion li volus, mi ne ordonus al li la plej malgrandan sangellason, la plej malgrandan klistereton, kaj

mi al li dirus: krevu, krevegu; tio lernigos al vi alian fojon, moki la Medicinan Fakultaton.

Beraldo. Vi ja fortege lin koleras.

Argano. Jes, li estas maldiskretulo; kaj se la kuracistoj estas saĝaj, ili faros, kion mi diris.

Beraldo. Li estos ankoraŭ pli saĝa ol viaj kuracistoj, ne petante pri ilia helpo.

Argano. Des pli malbone por li, se li malŝatas iliajn rimedojn.

Beraldo. Li certe havas bonan motivon, ilin ne uzi, ĉar li pretendas, ke ili nur estas permesataj al vivpovaj kaj fortikaj homoj, kiuj posedas troajn fortojn, por elporti la rimedojn kune kun la malsano; sed ke li havas ĝuste nur tiom da forto, por elporti sian malsanon.

Argano. Kiaj malsaĝaj motivoj tiuj ĉi estas! Haltu, mia frato, ni ne parolu plu pri tiu homo, ĉar tio incitas en mi la galon, kaj vi povus min remalsanigi.

Beraldo. Tre volonte, mia frato, kaj por aliigi nian interparoladon, mi volis nur diri al vi, ke pro malgranda malobeemo, kiun via filino al vi montris, vi ne devas ekpreni la perfortan decidon, meti ŝin en monahinejon; ke rilate la elekton de bofilo vi ne devas blinde sekvi la pasion, kiu vin puŝegas; kaj ke tiurilate oni devas iom konformiĝi al la inklino de filino, ĉar de ĝi ja dependas la tutviva feliĉo de edziĝo.

Sceno kvara.

S-ro Floranto (kun klistero en mano). Argano. Beraldo.

Argano. Ha, mia frato! Kun via permeso . . .

Beraldo. Kiel? Kion vi volas fari?

Argano. Preni nur tiun ĉi klisteron; estos baldaŭ farite.

Beraldo. Vi mokas: ĉu vi do ne povus esti unu momenton sen klistero aŭ sen medikamentoj? Prokrastu tion je alia fojo; kaj permesu al vi iom da ripozo.

Argano. Sinjoro Floranto, ĝis hodiaŭ vespere aŭ ĝis morgaŭ matene.

S-ro Floranto (al Beraldo). Kiel vi povas riski, kontraŭstari la ordonojn medicinajn, kaj malhelpi sinjoron, preni klisteron! Via maltimo efektive estas sufiĉe aroganta.

Beraldo. Foriru, sinjoro, oni bone vidas, ke vi ne kutimas, paroli al vizaĝoj.

S-ro Floranto. Estas tre malkonvene, tiel moki kuracilojn kaj rabi al mi la tempon. Mi ĉi tien venis nur sekve de speciala ordono; kaj mi diros al sinjoro Purgono, kiel oni min malhelpis, plenumi liajn ordonojn kaj miajn funkciojn. Vi vidos, vi vidos

Sceno kvina.

Argano. Beraldo.

Argano. Vi certe kaŭzis tie ĉi ian malfeliĉaĵon.

Beraldo. Jes, la grandan malfeliĉaĵon, ke vi ne estas preninta klisteron, kiun Purgono ordonis! Ankoraŭ unu fojon, mia frato, ĉu estas eble, ke ne ekzistas helpilo, por kuraci vin de la malsano de la kuracistoj. Ĉu vi volas efektive vian tutan vivon esti enterigita inter iliaj kuraciloj?

Argano. Mia Dio, mia frato, vi parolas pri tio kiel homo, kiu bone fartas; sed, se vi estus je mia loko, vi certe ŝanĝus viajn paroladojn. Estas tre facile, paroli kontraŭ la medicino, kiam oni tute sanas.

Beraldo. Pri kia malsano do vi plendas?

Argano. Vi min furiozigos. Mi dezirus, ke vi havu mian malsanon, por ke mi povu vidi, ĉu vi tiam tiel babiladus. Ho, jen estas sinjoro Purgono.

Sceno sesa.

S-ro Purgono. Argano. Beraldo. Toineto.

S-ro Purgono. Mi ĵus estas aŭdinta antaŭ la pordo belegajn novaĵojn; ke oni mokis tie ĉi miajn receptojn, kaj rifuzis preni la de mi ordonitan kuracilon.

Argano. Sinjoro, ne estas . . .

S-ro Purgono. Tio estas grandega impertinenteco, stranga ribelo de malsanulo kontraŭ lia kuracisto!

Toineto. Tio estas terurega.

S-ro Purgono. Klisteron, kiun mi mem plezure kunmetis!

Argano. Ne estas mi . . .

S-ro Purgono. Elpensis kaj pretigis laŭ ĉiuj reguloj de la arto!

Toineto. Li estas malprava.

S-ro Purgono. Kaj kiu devis fari mirindan efikon en la internaĵo.

Argano. Estas mia frato . . .

S-ro Purgono. Malestimege resendi!

Argano (montrante al Beraldo). Estas li . . .

S-ro Purgono. Tio estas faro ekscesa!

Toineto. Tio estas vera!

S-ro Purgono. Grandega atenco kontraŭ la medicino!

Argano (montrante al Beraldo). Li estis la kaŭzo . . .

S-ro Purgono. Krime de la ofendita fakultato, krime, kiu ne povas esti sufiĉe punata.

Toineto. Vi estas prava.

S-ro Purgono. Mi deklaras al vi, ke mi ĉesigos ĉian ajn interrilaton inter ni.

Argano. Estis mia frato . . .

S-ro Purgono. Ke mi ne deziras plu interligon kun vi.

Toineto. Bone, tre bone!

S-ro Purgono. Kaj por pravi al vi, ke ĉiu rilato inter ni ĉesos, mi disŝiras per-ĉi la donakton, kiun mi destinis al mia nevo por lia edziĝo. (Li disŝiras la donakton kaj ĵetas la pecojn teren.)

Argano. Estas mia frato, kiu faris la tutan malbonon.

S-ro Purgono. Tiel malestimi mian klisteron.

Argano. Venigu ĝin, mi tuj ĝin prenos.

S-ro Purgono. Plej baldaŭ mi vin estus liberiginta de ĉiu mizero.

Toineto. Li ne ĝin meritas.

S-ro Purgono. Mi estis purigonta vian korpon kaj elirigonta el ĝi ĉiujn malbonajn fluidaĵojn.

Argano. Ho, mia frato, mia frato!

S-ro Purgono. Nur dekduo da medikamentoj estus sufiĉintaj, por tutege elpreni vian internaĵon.

Toineto. Li ne estas inda je viaj klopodoj.

S-ro Purgono. Sed ĉar vi ne volas resaniĝi per miaj manoj . . .

Argano. Ne estas mia kulpo.

S-ro Purgono. Ĉar vi rifuzis la obeon, kiun oni ŝuldas al sia kuracisto . . .

Toineto. Tio kriegas pri venĝo!

S-ro Purgono. Ĉar vi vin deklaris rebelo kontraŭ la kuraciloj, kiujn mi al vi ordonis . . .

Argano. Ho, tute ne!

S-ro Purgono. Mi al vi deklaras, ke mi vin lasos al via malbona korpo-konstitucio, al la malordo de via internaĵo, al la putriĝo de via sango, al l'acideco de via galo kaj al la ameleco de viaj fluidaĵoj.

Toineto. Tre bone farite!

Argano. Ho, mia Dio!

S-ro Purgono. Kaj mi deziras, ke post paso de kvar tagoj vi vin trovu en stato neresanigebla!

Argano. Kompaton! Ho, kompaton!

S-ro Purgono. Ke vi enfalu en bradipepsion (malrapida digestado).

Argano. Sinjoro Purgono!

S-ro Purgono. El bradipepsio en dispepsion (malfacila digestado).

Argano. Sinjoro Doktoro!

S-ro Purgono. El dispepsio en apepsion (sendigestado).

Argano. Sinjoro Purgono!

S-ro Purgono. El apepsio en lienterion (maldigestaĵa lakso).

Argano. Sinjoro Purgono!

S-ro Purgono. El lienterio en disenterion (danĝera subventro-malsano kun sangaj ekskrementoĵoj).

Argano. Sinjoro Doktoro!

S-ro Purgono. El disenterio en hidropson (malsanhava amasaĵo de akvo en la korpaj kavaĵoj kaj histoj).

Argano. Sinjoro Doktoro!

S-ro Purgono. Kaj el hidropso en la lastan stadion de la vivo, al kiu via malsaĝo vin estos kondukita.

Sceno sepa.

Argano. Beraldo.

Argano. Ho, mia Dio! Mi estas mortonta; mia frato, vi min pereigis.

Beraldo. Nu, kio okazis?

Argano. Mi ne plu povas vivi. Mi jam sentas, ke la medicino sin venĝos.

Beraldo. Efektive, mia frato, vi estas frenezulo; kaj pro ĉio mi ne volus, ke oni vin vidu tiel agi. Kuraĝiĝu iom, mi vin petas, rekonsciiĝu kaj ne cedu tiom vian fantazion.

Argano. Ĉu vi ne aŭdis, mia frato, per kiaj strangaj malsanoj li min menacis?

Beraldo. Ne estu do tia simplulo.

Argano. Li diris, ke mi estos neresanigebla antaŭ paso de kvar tagoj.

Beraldo. Ĉu eble okazos, kion li antaŭdiris? Ĉu estas oraklo, kion li diris? Kiu vin aŭdas, povus kredi, ke sinjoro Purgono tenas en siaj manoj vian vivfadenon, kaj ke li povas per superega aŭtoritato ĝin plilongigi aŭ mallongigi

laŭ lia plaĉo. Pripensu do, ke la principoj de via vivo estas en vi mem, kaj ke la kolerego de sinjoro Purgono tiel same malkapablas, vin mortigi, kiel liaj kuraciloj povas vin revivigi. Tio estas okazo, se vi volas, vin liberigi de la kuracistoj; sed se vi nepre ne povas malhavi ilin, ne estos malfacile, trovi alian, ĉe kiu vi, mia frato, iom pli malmulte riskus.

Argano. Ho, mia frato, li perfekte konas mian korpstaton, kaj scias, kiamaniere mi devas esti kuracata.

Beraldo. Oni devas konfesi, ke vi estas homo plena de antaŭjuĝoj, kaj ke vi rigardas la aferojn per strangaj okuloj.

Sceno oka.

Argano. *Beraldo.* *Toineto.*

Toineto (al *Argano*). Sinjoro, jen estas kuracisto, kiu deziras paroli kun vi.

Argano. Kia kuracisto?

Toineto. Kuracisto de la medicino.

Argano. Mi opinias, kiel li sin nomas.

Toineto. Mi ne lin konas, sed li similas al mi kiel unu guto de akvo al alia; kaj se mi ne certe sciuss, ke mia patrino estis honesta edzino, mi dirus, ke li estas ia frateto, kiun ŝi al mi donis post la morto de mia patro.

Argano. Igu lin enveni.

Sceno naŭa.

Argano. Beraldo.

Beraldo. Vere, oni vin servas laŭ via deziro; dum unu kuracisto vin lasas, alia sin prezentas.

Argano. Mi tre timas, ke vi estos kaŭzinta grandan malfeliĉaĵon.

Beraldo. Denove? Vi ja ĉiam reparolas pri tio.

Argano. Ho, vidu, mia frato, ĉiuj tiuj malsanoj, kiujn mi ne konas, premas mian koron, tiuj...

Sceno deka.

Argano. Beraldo. Toineto (kiel kuracisto).

Toineto. Permesu al mi, sinjoro, fari al vi viziton kaj prezenti al vi miajn malgrandajn servojn por ĉiuj sangellasoj kaj laksigoj, kiujn vi bezonos.

Argano. Sinjoro, mi tre dankas al vi. (Al Beraldo.) Je mia fido; jen estas Toineto mem.

Toineto. Sinjoro, bonvolu min pardoni, mi forgesis doni komision al mia servisto; tuj mi revenos.

Sceno dekunua.

Argano. Beraldo.

Argano. Nu, ĉu tio ne estas efektive Toineto mem?

Beraldo. Jes, estas vero, ke la simileco estas

grandega; sed ne estas la unua fojo, ke oni vidas tiajn aferojn, kaj la historio estas plena je tiaj naturludoj.

Argano. Laŭ mi, mi estas forte surprizita pri tio; kaj . . .

Sceno dekdua.

Argano. Beraldo. Toineto.

Toineto. Kion vi deziras, sinjoro?

Argano. Kio?

Toineto. Ĉu vi ne vokis min?

Argano. Mi? Ne.

Toineto. Tiam kredeble miaj oreloj zumis.

Argano. Restu iom ĉi tie, por ke oni vidu, kiel la kuracisto vin similas.

Toineto. Jes, tio taŭgus al mi, mi havas aliajn okupojn, kaj mi lin sufiĉe vidis.

Sceno dektria.

Argano. Beraldo.

Argano. Se mi ne vidus ilin ambaŭ, mi kredis ilin unu persono.

Beraldo. Mi legis surprizintajojn de tiu speco de simileco; kaj mi mem iatempe spertis ekzemplojn, kiuj trompis ĉiujn.

Argano. Laŭ mi, mi ankaŭ estus trompita de tiu ĉi vido; kaj mi estus ĵurinta, ke ambaŭ estas unu tiu sama persono.

Sceno dekkvara.

Argano. Beraldo. Toineto (kiel kuracisto).

Toineto. Sinjoro, denove korege mi petas pri pardono.

Argano (mallaŭte al Beraldo). Estas mirinde.

Toineto. Ne akceptu malbone, sinjoro, la sciemon, kiun mi havas, vidi tian faman malsanulon, kia vi estas; via reputacio, kiu ĉien sin etendis, senkulpigos mian senĝenecon.

Argano. Sinjoro, mi estas via servanto.

Toineto. Mi vidas, sinjoro, ke vi min fiksege rigardas. Kian aĝon mi havas laŭ vi?

Argano. Laŭ mi vi estas apenaŭ dudekses ĝis dudeksejara.

Toineto. Ha, ha, ha, ha! Mi estas naŭdekjara.

Argano. Naŭdekjara?

Toineto. Jes, jen vi vidas la efikon de la sekretajojn de mia arto, min konservi tiel freŝa kaj vigla.

Argano. Je mia fido, vi estas bela juna maljunulo rilate al la aĝo de naŭdek jaroj.

Toineto. Mi estas pasanta kuracisto, kiu migras de urbo al urbo, de provinco al provinco, de reĝlando al reĝlando, por serĉi famajn objektojn por mia kapableco, por trovi malsanulojn indajn de mia kuracarto, konvenajn por min igi ekzerci la grandajn kaj belajn sekretojn, kiujn

mi trovis en la medicino. Mi malŝatas min amuzi je tiu amasaĉo da malsanoj ordinaraj, je tiuj bagateloj de reŭmatismoj kaj de intumeskoj (bronkopneŭnonioj,) je tiuj febretoj, vaporoj kaj ĥemikranioj. Mi deziras al mi gravajn malsanojn, bonajn febrojn daŭrantajn, kun cerba deliro, gravajn febrojn purpurajn, danĝerajn pestojn, gravajn hidropsojn naturajn, danĝerajn pleŭreziojn kun brusta inflamo; tio estas, kio al mi plaĉas; en tio ĉi mi triumfas; kaj mi dezirus, sinjoro, ke vi havus ĉiujn tiujn de mi nomitajn malsanojn, ke vi estu forlasita de ĉiuj kuracistoj, malesperinta, en agonio, por ke mi povu montri al vi la bonegecon de miaj kuraciloj kaj la deziron, servi al vi.

Argano. Multan dankon, sinjoro, vi estas tro afabla.

Toineto. Montru al mi vian pulson. — Nu, amiketo, batu kiel necesas. Hola! Mi igos vin bati, kiel vi devas. He! Tiu pulso estas imperinentulo. Mi bone vidas, ke vi ankoraŭ ne min konas. Kiu estas via kuracisto?

Argano. Sinjoro Purgono.

Toineto. Tiu sinjoro ne troviĝas en miaj registrolibro inter la eminentaj kuracistoj. Je kia malsano vi suferas laŭ lia opinio?

Argano. Je la hepato, kiel li diras; je la lieno laŭ aliaj.

Toineto. Ĉiuj estas nesciantoj; vi suferas je la pulmo.

Argano. Je la pulmo?

Toineto. Jes, kio doloras al vi?

Argano. De tempo al tempo mi sentas kapdolorojn.

Toineto. Ĝuste, estas la pulmo.

Argano. Kelkafoje ŝajnas al mi, ke mi havas vualon antaŭ la okuloj.

Toineto. Estas la pulmo.

Argano. Iafoje mi havas kordolorojn.

Toineto. La pulmo.

Argano. Mi sentas ofte lacecon en ĉiuj membroj.

Toineto. La pulmo.

Argano. Kaj kelkfoje ekkaptas min doloroj en la ventro, kvazaŭ mi havus kolikon.

Toineto. La pulmo. Ĉu vi havas apetiton al tio, kion mi manĝas?

Argano. Jes, sinjoro.

Toineto. La pulmo. Ĉu vi ŝatas trinki iom da vino?

Argano. Jes, sinjoro.

Toineto. La pulmo. Kaj vi ankaŭ ŝatas iom dormeti post tagmanĝo?

Argano. Jes, sinjoro.

Toineto. La pulmo; mi diras al vi, la pulmo tion kaŭzas. Kion ordonis via kuracisto, ke vi manĝu?

- Argano.* Li ordonis al mi supon.
- Toineto.* Ignoranto!
- Argano.* Kortbirdaĵon.
- Toineto.* Ignoranto!
- Argano.* Bovidaĵon.
- Toineto.* Ignoranto!
- Argano.* Buljonon.
- Toineto.* Ignoranto!
- Argano.* Freŝajn ovojn.
- Toineto.* Ignoranto!
- Argano.* Kaj vespere prunetojn, por malfermi la ventron.
- Toineto.* Ignoranto!
- Argano.* Kaj antaŭ ĉio, trinki mian vinon forte trempita.
- Toineto.* Ignorantus, ignoranta, ignorantum! Vi devas trinki vinon puran, por dikigi vian sangon. kiu estas tro maldika: vi devas manĝi bonan dikan porkaĵon, bonan holandan fromaĝon, plue grion kaj rizon, kaj maronojn kaj vaflojn, resume ĉion, kio gluigas kaj algluigas. Via kuracisto estas malspritulo. Mi sendos al vi iun el miaj helpantoj, kaj de tempo al tempo mi revenos vin vidi, dum mi loĝados en tiu ĉi urbo.
- Argano.* Koregan dankon, sinjoro.
- Toineto.* Kion, al la diablo, faras tiu ĉi via brako?
- Argano.* Kio?
- Toineto.* Anstataŭ vi, mi tuj igus ĝin fortranĉi.

Argano. Kaj kial?

Toineto. Ĉu vi do ne vidas, ke ĝi tiras al si la tutan nutraĵon, kaj ke ĝi malhelpas tiun ĉi flankon kreskadi?

Argano. Jes, sed mi bezonas mian brakon.

Toineto. Anstataŭ vi mi ankaŭ igus elpiki al mi la dekstran okulon.

Argano. Elpiki unu okulon?

Toineto. Ĉu vi ne vidas, ke ĝi ĝenas la alian kaj forprenas de ĝi la nutraĵon? KREDU MIN, elpiku ĝin kiel eble plej baldaŭ; vi tiom pli bone vidos per la alia.

Argano. Tio ne urĝas.

Toineto. Adiaŭ, mi tre bedaŭras, ke mi jam devas vin forlasi; sed estas necese, ke mi partoprenu en konsiliĝon pri homo, kiu hieraŭ mortis.

Argano. Pri viro, kiu hieraŭ mortis?

Toineto. Jes, por esplori, kion oni estus devinta fari, por resanigi lin. Ĝis revido.

Argano. Vi bone scias, ke mi kiel malsanulo ne povas vin elakompani.

Sceno dekkvina.

Argano. Beraldo.

Beraldo. Tio estas efektive kuracisto, kiu ŝajnas esti tre lerta.

Argano. Jes, sed li iom trorapidas.

Beraldo. Ĉiuj famaj kuracistoj estas tiaj.

Argano. Detranĉi de mi unu brakon, kaj elpiki de mi unu okulon, por ke la aliaj pli bone fartu? Mi preferas, ke ili ne tiel bone fartas. Bela operacio, kiu igus min unuokululo kaj braĥostumpulo!

Sceno dekseca.

Argano. Beraldo. Toineto.

Toineto (ŝajnigante paroli kun iu). For, iru for, sinjoro! Mi estas via servantino. Mi tute ne deziras ridi.

Argano. Kio okazis?

Toineto. Nu, via kuracisto volis palpi mian pulson.

Argano. Vidu do! Tiu naŭdekjarulo!

Beraldo. Nu bone, mia frato, ĉar via sinjoro Purgono malpaciĝis kun vi, vi eble konsentas, ke mi parolas kun vi pri la partio, kiu prezentas sin al mia nevino.

Argano. Ne, mia frato, mi intencas, meti ŝin en monaĥinejon, ĉar ŝi kontraŭstaris mian volon. Mi bone rimarkas, ke ekzistas ia amindumajo; kaj mi malkovris ian intervidiĝon sekretan, kion oni ja ne supozas.

Beraldo. Nu bone, mia frato, se ankaŭ ekzistus ia malgranda inklinemo, ĉu tio estus krimo? Kaj ĉu vi povas esti ofendita, se ĉio restas honesta kaj celas edziĝon?

Argano. Malgraŭ ĉio, mia frato, ŝi fariĝos monahino, tio estas decidita.

Beraldo. Vi volas esti kompleza al iu.

Argano. Mi komprenas vin; vi ree aludas mian edzinon.

Beraldo. Nu jes, mia frato; estas, malkaŝe dirite, via edzino, kiun mi celas; kiel mi malamas vian pasion por la medicino, tiel mi ne povas aprobi vian pasion por ŝi, kaj ne povas vidi, vin senpripense kurantan en la kaptilojn, de ŝi pretigitajn.

Toineto. Ha, sinjoro, ne parolu tiamaniere pri la sinjorino. Ŝi estas edzino malriproĉinda, edzino senartifika, kaj kiu sinjoron amas, neelparoleble amas.

Argano. Demandu nur Toineton pri la karesoj, kiujn ŝi montras al mi.

Toineto. Tio estas vero.

Argano. Pri la maltrankvileco, kiun mia malsano kaŭzas al ŝi.

Toineto. Certe.

Argano. Kaj pri la zorgado kaj penado, per kiuj ŝi min ĉirkaŭas.

Toineto. Estas sendube. (Al Beraldo.) Ĉu vi volas, ke mi vin konvinku, kaj ke mi tuj vidigu al vi, kiom ŝi amas sian edzon? (Al Argano.) Sinjoro, permesu al mi, ke mi malfermu al li la okulojn, kaj ke mi forprenu de li lian eraron.

Argano. Kial do?

Toineto. Sinjorino estas tuj revenonta; ekkuŝu laŭlonge en vian seĝon kaj ŝajnigu esti mortinta; vi vidos ŝian doloron, kiam mi sciigos al ŝi tiun ĉi novaĵon.

Argano. Mi konsentas.

Toineto. Jes, sed ne lasu ŝin longtempe en tiu malespero; ĉar tio povus ŝin eble mortigi.

Argano. Lasu min agi.

Toineto (al Beraldo). Kaŝiĝu en la tiea angulo.

Sceno deksepa.

Argano. *Toineto.*

Argano. Ĉu ne estas danĝere, imiti mortinton?

Toineto. Ne, ne; kia danĝero ekzistus? Etendiĝu nur tie. Estos plezuro, malpravigi vian fraton. Jen estas sinjorino. Restu trankvila.

Sceno dekoka.

Belino. *Argano* (etendiĝinta sur seĝo). *Toineto.*

Toineto (ŝajnigante ne vidi Belinon). Ho, mia Dio! Ho, kia malfeliĉo! Kia stranga okazaĵo!

Belino. Kio estas, *Toineto*?

Toineto. Ho, sinjorino!

Belino. Kio okazis?

Toineto. Via edzo estas mortinta.

Belino. Mia edzo estas mortinta?!

Toineto. Ho, jes, la malfeliĉulo estas mortinta.

Belino. Certe?

Toineto. Certe. Ankoraŭ neniu sciigis pri tio; mi troviĝis tie ĉi tute sola; li mortis inter miaj brakoj. Vidu, jen li kuŝas laŭlonge en sia seĝo.

Belino. La ĉielo estu laŭdata! Nun mi estas liberigita de granda ŝarĝo. Ne estu tiel malsaĝa, Toineto, tiom ĉagreniĝi de tiu ĉi morto.

Toineto. Mi kredis, sinjorino, ke oni devus plori.

Belino. Ha, lasu nur, tio ne penindas. Kion valoras tiu perdo? Al kiu li utilis sur la tero? Li estis homo tre maloportuna por ĉiuj, malpura, abomena, senĉese havanta enŝprucaĵon aŭ medikamenton en sia ventro; puriganta la nazon, tusanta, ĉiam kraĉanta; homo senspirita, enuiga, malbonhumora, laciganta ĉiam la homojn kaj mal-laŭdanta la geservistojn tage kaj nokte.

Toineto. Jen tre bela funebra parolado.

Belino. Vi nun devas helpi min, Toineto, plenumi mian intencon, kaj vi povas esti certigita, ke vi estos laŭmerite rekompencata. Ĉar feliĉe ankoraŭ neniu estas sciigita pri la afero; ni portu lin en lian liton, kaj ni sekretigu tiun ĉi morton, ĝis kiam mi plenumis mian projekton. Ekzistas paperoj, ekzistas mono, kiujn mi volas havigi al mi; estus maljuste, se mi estus pasiginta la plej belajn jarojn de mia vivo ĉe li sen kompensaĵo. Venu, Toineto, antaŭe ni prenu ĉiujn liajn ŝlosilojn.

Argano (saltleviĝante). Malrapide!

Belino. Ho ĉielo!

Argano. Jes, sinjorino mia edzino, ĉu tio estas via amo?

Toineto. Ho, ho, la mortinto reviviĝis.

Argano (al *Belino*, kiu estas forironta). Mi tre ĝojas, esti ekkoninta vian amon, kaj esti aŭdinta la belan laŭdadon, kiun vi diris pri mi. Tiu sperto igos min pli prudenta estonte, kaj min malhelpos, plenumi certajn aferojn.

Sceno deknaŭa.

Beraldo (elirante el sia kaŝejo). *Argano*. *Toineto*.

Beraldo. Ĉu vi nun vidis ĝin, mia frato?

Toineto. Je mia fido, tion mi neniam estus kredinta. Sed mi aŭdas vian filinon aliranta: rekuŝiĝu kiel antaŭe, kaj ni vidu, kiamaniere ŝi akceptos la sciigon pri via morto. Ne estas malbone, provi la homojn laŭ ilia valoro, kaj ĉar ni ĵus estas en farado, vi per tio sciigos, kion via familio sentas por vi. (*Beraldo* ree kaŝiĝas.)

Sceno dudeka.

Argano. *Angeliko*. *Toineto*.

Toineto (ŝajnigante, ke ŝi ne vidas *Angelikon*).
Ho ĉielo, ho, ĉielo! Kia ĉagreniga okazintaĵo!
Ho malfeliĉa tago!

Angeliko. Kio okazis, Toineto, kaj pri kio vi ploras?

Toineto. Ho ve! Mi havas tre malĝojigajn novaĵojn por vi!

Angeliko. Nu, kiajn do?

Toineto. Via patro estas mortinta.

Angeliko. Mia patro estas mortinta, Toineto?

Toineto. Jes, vidu, jen li kuŝas; li ĵus estas mortinta sekve de malforto, kiu lin ekkaptis.

Angeliko. Ho, ĉielo! Kia malfeliĉo! Kia kruela trafo! Ho ve, kial mi devis perdi mian patron, la solan koron, kiu restis al mi en la mondo; kaj je mia plej granda malespero mi lin perdis en momento, kiam li min koleris. Kio mi fariĝos, mi malfeliĉulino! Kie mi trovos konsolon post tia granda perdo!

Sceno dudekunua.

Argano. Angeliko. Kleanto. Toineto.

Kleanto. Kio okazis al vi, bela Angeliko? Kaj kian malfeliĉon vi priploras?

Angeliko. Ho, mia Dio! Mi ploras pri la plej kara kaj la plej valora, kion mi povis perdi en tiu ĉi mondo; mi ploras pri la morto de mia patro.

Kleanto. Ho ĉielo! Kia akcidento! Kia maltrafo neatendita! Ho ve! Post kiam vi petegis

vian onklon, subteni ĉe li mian proponon, mi ĵus estis prezentonta min al li kaj provonta, tuŝi lian koron per miaj respekto kaj petoj kaj konsentigi lin je miaj deziroj.

Angeliko. Ho, Kleanto! Ni ne parolu plu pri tio. Preterlasu ni ĉiujn edziĝpensojn. Perdinte mian patron, mi rifuziĝos je ĉio. Jes, mia amata patro, se antaŭ nelonge mi estas kontraŭstarinta vian volon, mi almenaŭ volas plenumi unu el viaj intencoj kaj rebonigi per tio la ĉagrenon, kiun mi, je mia granda doloro, estas farinta al vi. (Genuiĝante.) Permesu, mia patro, ke mi donu tie ĉi mian vorton, kaj ke mi vin ĉirkaŭprenu, por montri al vi mian dankemon.

Argano (ĉirkaŭprenante Angelikon). Ha, mia filino!

Angeliko. Ho mia Dio!

Argano. Alvenu! Ne timu, mia filino, mi ne estas mortinta. Jes, vi estas de mia propra sango, vi estas mia vera filino, kaj mi ĝojegas, esti ekkoninta vian bonan koron.

Sceno dudekdua.

Argano. Beraldo. Angeliko. Kleanto. Toineto.

Angeliko. Ha, kia agrabla surprizo! Ha, mia patro! Ĉar, per eksterordinara feliĉo, la ĉielo vin estas redoninta al mi, permesu al mi, ke mi tie

ĉi genuu antaŭ vi kaj ion petegas de vi. Se vi ne estas favora al la inklinemo de mia koro, se vi rifuzas al mi Kleanton kiel edzon, mi vin petegas almenaŭ, ke vi ne min devigu, edziniĝi alian. Tio estas la sola favoro, kiun mi petas de vi.

Kleanto (genuiĝante antaŭ Argano). Ha, sinjoro, lasu vin tuŝi per ŝiaj petoj kaj per miaj, kaj ne kontraŭstaru pli longe al tia bela reciproka inklinemo.

Beraldo. Mia frato, ĉu vi vere povas kontraŭstari tion?

Toineto. Sinjoro, ĉu vi ne estas tuŝita de tiom da amo?

Argano. Supoze ke li fariĝas kuracisto, mi konsentas la edziĝon. Jes, (al Kleanto) fariĝu kuracisto, kaj vi ricevos mian filinon.

Kleanto. Tre volonte, sinjoro, se vi nur tion postulas; por povi fariĝi via bofilo, mi fariĝos kuracisto, eĉ apotekisto, se vi volas. Tio estas bagatelo, sinjoro; por atingi la belan Angelikon, mi plenumus ankoraŭ pli malfacilajn kondiĉojn.

Beraldo. Sed, atentu, mia frato, mi havas bonegan ideon. Fariĝu vi mem kuracisto. La oportuneco estos ankoraŭ multe pli granda, se vi havos en vi mem ĉion, kion vi bezonas.

Toineto. Jes, tio estas vera kaj la plej taŭga rimedo, por vin resanigi kiel eble plej baldaŭ, ĉar ne ekzistas malsano, kiu kuraĝus ataki kuraciston.

Argano. Mi kredas, mia frato, ke vi volas min moki. Ĉu mi eble estas en konvena aĝo, por studadi?

Beraldo. Studadi? Pa! via klereco tute sufiĉos; inter la kuracistoj ne estas multaj, kiuj estas tiel lertaj kiel vi.

Argano. Sed pro tio oni devas scii, bone paroli la lingvon latinan, oni devas koni la malsanojn kaj la kuracilojn kontraŭ ili.

Beraldo. Ricevinte la robon kaj la ĉapon de kuracisto, vi ĉion tion ekscios; kaj poste vi estos pli prudenta ol vi deziras.

Argano. Kio? Oni scipovas paroladi pri la malsanoj, estinte vestita de tiu ĉi robo?

Beraldo. Jes, se oni paroladas kun robo kaj ĉapo, ĉiu galimatiaso fariĝas saĝa, kaj ĉiu malsaĝaĵo fariĝas prudentaĵo.

Toineto. Pripensu, sinjoro, ke, se eĉ vi havus nenion ol vian barbon, tio jam estus grava afero; ĉar la barbo valoras pli ol la duono de kuracisto.

Argano. Ĉiaokaze mi estas preta je ĉio.

Beraldo (al Argano). Ĉu vi volas, ke la afero tuj komencu?

Argano. Tuj? Kiamaniere?

Beraldo. Nu, tie ĉi en via domo.

Argano. En mia domo?

Beraldo. Jes, mi konas amikan fakultaton, kiu tuj aperos, por plenumi la ceremoniojn en via salono. Tio kostos al vi nenion.

Argano. Sed mi, kion mi diros, kion mi respondos?

Beraldo. Tion oni sciigos al vi per du vortoj, kaj oni donos al vi skribe, kion vi diros. Iru por vestiĝi per konvena robo. Mi iros por alvenigi la sinjorojn.

Argano. Nu, bone, tion ni rigardadu.

Sceno dudektria.

Beraldo. Angeliko. Kleanto. Toineto.

Kleanto. Kion vi volas diri per via „amika fakultato“?

Toineto. Kion vi intencas?

Beraldo. Ni volas iom amuziĝi hodiaŭ vespere. La artistoj verkis malgrandan interludon pri la promocio de kuracisto, kun dancoj kaj muziko; tio nin plezurigos, kaj mia frato devas ludi en tio la ĉefan rolon.

Angeliko. Sed, mia onklo, ĉu vi ne timas, iom ofendi mian patron?

Beraldo. Ne, kara nevino, ni nur akomodiĝos al liaj fantaziaĵoj. Ĉio tio restos inter ni. Ĉiu el ni ja povas ankaŭ preni sur sin ian rolon, kaj ni povas ion ludi unu al la alia. La karnavaltempo tion permesas. Ni rapide ĉion preparu.

Kleanto (al *Angeliko*). Ĉu vi konsentas?

Angeliko. Ha jes, ĉar mia onklo nin kondukos.

Fino.

=== Komedioj. ===

- Advokato Patelin**, triakta proza komedio,
esp. M. J. Evrot. Sm. 0.400.
- Amabileto**, komedio unuakta, esp. Ender. Sm. 0.200.
- Angla lingvo sen Profesoro**, triakta komedio,
esp. Gaston Moch. Sm. 0.500.
- La Antaŭdiro**, komedio en du aktoj de Chs. Stewart.
Sm. 0.300.
- Cikado ĉe Formikoj**, unuakta komedio
de Labiche kaj Legouvé. Sm. 0.300
- Du Biletoj**, unuakta komedio, esp. de Bulthuis kaj
Touchebeuf. Sm. 0.200.
- Edziĝo kontraŭ volo**, unuakta komedio de Molière,
esp. de Dufeutrel. Sm. 0.300.
- La fianĉiniĝo de sovaĝulineto**, triakta komedio
de Roksano. Sm. 0.300.
- La Gasto**, duakta komedio de S-ino Valienne.
Sm. 0.250.
- Georgo Dandin**, komedio en tri aktoj, esp. de
D-ro Zamenhof. Sm. 0.550.
- La nevo kiel onklo**, komedio en tri aktoj de
Schiller, esp. de Stewart. Sm. 0.500.
- Perfekta kuracistino**, unuakta komedio,
esp. de E. Ramo. Sm. 0.250.
- Sinjoro Badin**, unuakta komedio,
esp. de R. Beck kaj R. Jean. Sm. 0.125.
- La Supujo**, unuakta komedio de S. Meyer. Sm. 0.200.
- Tri unuaktaj komedioj:** Sm. 0.400.
- La malfeliĉuloj de A. v. Kotzebue.
- Tie ĉi oni parolas Esperante de T. Williams.
- La renkonto de M. Hankel.
- La Vangfrapo**, unuakta komedio de A. Dreyfus,
esp. de S. Sar. Sm. 0.400.


Germana Esperanto-Librejo, Leipzig

Noveloj kaj Romanoj.

- Ama vivo en la naturo** (unu ĉapitro) de W. Bôlsche,
esp. de L. E. Meier. Sm. 0.500.
- Ĉu li?**, romano originale verkita de D-ro Vallienne.
Sm. 1.750.
- Diversaĵoj, Rakontetoj**
tradukitaj de Lallemand kaj Beau. Sm. 0.550.
- Du rakontoj** de D. de Rothau. La blanka kastelo.
Esperanto hotelo. Sm. 0.500.
- La Faraono**, romano de Prus,
esp. de D-ro Kabe. 3 volumoj po Sm. 0.900.
- Grasa lignaĵisto**, firenza novelo, esp. de G. Chavet.
Sm. 0.250.
- Imenlago** de Theodor Storm,
esp. de A. Bader. Sm. 0.400.
- Kastelo de Prelongo**, granda romano orig. verkita
de D-ro Vallienne. Sm. 1.750.
- Kio okazis foje en Sidono**, Humoresko de
H. Sienkiewicz, esp. de A. Grabowski. Sm. 0.300.
- Kio povas okazi se oni donacas surprize**
de Fr. Reuter, esp. de Ĉefeĉ. Sm. 0.250.
- Marta**, rakonto de Orzeszko,
esp. de D-ro L. L. Zamenhof. Sm. 1.500.
- Ni sekvu Lin** de H. Sienkiewicz,
esp. de Br. Kuhl. Sm. 0.450.
- Paŭlo kaj Virginio** de Bernardin de St. Pierre,
esp. de H. Hodler. Sm. 0.650.
- Rakontoj al mia belulino** de Jean Bach-Sisley.
Sm. 0.900.
- Rozo sovaĝa aŭ pentita kulpo**, novelo de P. Kress.
Sm. 0.100.
- Sep rakontoj**, originale verkitaj de J. Malfeliĉulo.
Sm. 0.500.

Germana Esperanto-Librejo, Leipzig

HERM. SCHNEIDER, LEIPZIG 11569728.



Efikplenaj Propagandiloj

Inkosorbilo „Esperanto“ sen sorba papero

kun verdaj steloj, terglobo kaj surskribo „Esperanto“.

Sm. 0.65, 10 ekz. Sm. 5,50, neafrankite.

Tiu ĉi bela kaj praktika novaĵo, sen sorba papero, kun speciala daŭre inkon sorbema maso, ŝparigas tempon kaj monon per sia ĉiumomenta uzebleco kaj daŭremeco.

Trege taŭga donaco.

Internacia-Propaganda-Koresp.-Poŝtkarto.



Seslingva kun plej nova bildo de D-ro Zamenhof.

Po 10 ekz. Sm. 0.15, po 50 ekz. Sm. 0.55,
po 100 ekz. Sm. 0.90, po 1000 ekz. Sm. 5.20 afrankite.

Gesamideanoj, uzu por viaj korespondadoj sole ĉi tiun Esperanto-Poŝtkarton.

SIGELMARKOJ

reliefe stampitaj

 **Bonega propagandilo** 

Surhavas la terglobon kaj verdan stelon.

La teksto estas nur en Esperanto.

Po 50 ekz. Sm. 0.25, po 100 ekz. Sm. 0.35, po 1000 ekz. Sm. 2.65
ĉien afrankite.

Deutsche Esperanto-Buchhandlung, Leipzig

Emblemoj

Esperantistaj



Belega, verda stelo, vere arĝenta.

☞ Ĉie prefere portataj. ☜

Du grandecoj:

10 mm (n-ro 1), 15 mm (n-roj 2—5).

La insignoj n-roj 2—5 havas
la surskribon „Esperanto“.

Nro 1-a malgranda kravatpinglo:

po unu Sm. 0.20; po 10 Sm. 1.75

Nro 2-a belega kravat-aŭ vestpinglo:

po unu Sm. 0.30; po 10 Sm. 2.50

Nro 3-a la sama, broĉforma:

po unu Sm. 0.30; po 10 Sm. 2.50

Nro 4-a la sama por butontruo:

po unu Sm. 0.30; po 10 Sm. 2.50

Nro 5-a la sama kiel manubutonoj kun ĉenetoj:

po paro Sm. 0.75; po 10 paroj
Sm. 6.25

Ĉiuj insignoj surhavas la arĝentstampon.

De

Książnica Podlaska
im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku

Leipzig



000678370